

Markso hodiaŭ

Nerefuteblaj citaĵoj

Markso hodiaŭ

Nerefuteblaj citaĵoj

Tradukitaj de
Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)

Markso hodiaŭ
Nerefuteblaj citaĵoj
Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano
Monda Asembleo Socia (MAS)
2-a eldono 2010
ISBN 978-2-918300-29-8

Originalo:

Marx heute
Unschlagbare Zitate
Auswahl und Zusammenstellung:
Johannes Oehme
ISBN 978-3-355-01704-6
3. Auflage 2007
© 2005 für diese Ausgabe:
Neues Leben Verlags GmbH & Co. KG
Neue Grünstraße 18, 10179 Berlin

„La idealistoj ofte pensas, ke al la materiismo mankas, por ke ili povu alte taksi ĝin, nur io - idealisma.” (Berto Breĥto)

Enhavo

Pensado kaj agado.....	8
Homo kaj socio.....	19
Laboro kaj eskpluatado.....	26
Kapitalo kaj profito.....	37
Historio kaj estonteco.....	60
Revolucio kaj politiko.....	73
Socialismo kaj komunismo.....	87
Esperantaj versioj de verkoj de Karlo Markso cititaj en tiu ĉi libro.....	95
Postparolo de la tradukinto.....	97

Pensado kaj agado

Ĉian juĝon de scienca kritiko mi bonvenigas. Fronte al la antaŭjuĝoj de la tiel nomata publika opinio, al kiu mi neniam faris koncedojn, validas daŭre la devizo de la granda florencano:

„Segui il tuo corso, e lascia dir le genti! – Iru vian vojon, kaj lasu la homojn paroli!”

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 18

*

La nomo de aĝo estas tute ekstera al ĝia naturo. Mi scias nenion pri homo, se mi scias ke homo nomiĝas Jakobo. Same en la monnomoj pundo, talero, franko, dukato ktp malaperas ĉia spuro de la valorrilato.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 119

Ĉia scienco estus superflua, se la aperformo kaj la esto de la aferoj senpere kunestus.

Das Kapital, MEW 25, 825

*

La senpera realeco de la penso estas la *lingvo*.

Die deutsche Ideologie, MEW 19, 432

*

La esplorado devas alproprigi al si la materialon detale, analizi ĝiajn diversajn evoluformojn kaj eltrovi ties internan ligon. Nur post kiam tiu laboro estas plenumita, oni povas laŭ tio prezenti la realan movadon.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 27

Pensado kaj agado

*

Ĉe la analizado de la ekonomiaj formoj krome ne povas servi mikroskopo nek ĥemiaj reakciiloj. La abstraktiga forto devas anstataŭi ambaŭ.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 15

*

[La dialektiko staras ĉe Hegelo] sur la kapo. Oni devas inversigi ĝin, por malkovri la racian kernon en la mistika ŝelo.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 27

*

Mia dialektika metodo estas fundamente ne nur malsama ol la hegela, sed ĝia rekta malo. Por Hegelo la pensado, kiun li sub la nomo de ideo eĉ transformas al memstara subjekto, estas la mondkreanto¹ de la realaĵo kiu siavice estas nur ĝia ekstera aperformo. Ĉe mi, inverse, la ideeco estas nenio alia ol la materieco transformita kaj tradukita en la homkapo.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 27

*

Tiu ĉi skizo pri la evoluo de miaj studaĵoj en la fako de politika ekonomio havas nur la taskon pruvi, ke miaj opinioj, kiel ajn oni prijuĝas ilin kaj kiom ajn malmulte ili kongruas kun la interesitaj antaŭjuĝoj de la regantaj

1 Originalo: der Demiurg [la demiurgo, t.e. mondkreanto]. -vl

klasoj , estas la rezulto de skrupula kaj longjara esplorado. Sed ĉe la enirejo de la scienco, kiel ĉe la enirejo de la infero, staru nepre la postulo:

Qui si convien lasciare ogni sospetto

Ogni viltà convien che qui sia morta.

[„Ĉi tie nepras forlasi ĉian suspekton,

Kaj ĉia malkuraĝo devas morti.” *Danto, „Dia Komedio”*]

Zur Kritik der politischen Ökonomie, Vorwort, MEW 13, 11

*

Hegelo implikiĝis [...] en la iluzion koncepti la realon kiel rezulton de la [...] el si mem moviĝanta pensado, dum la metodo supreniri de la abstrakto al la konkreto estas nur la maniero por la pensado alproprigi al si la konkreton, reprodukti ĝin kiel mense konkretan. Sed ĝi estas neniel la estiĝ-procezo de la konkreto mem.

Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42, 35

*

La konkreto konkretas, ĉar ĝi estas la sumo de multaj difinoj, do la unueco de la diverseco.

Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42

*

La tutaĵo, kia ĝi aperas en la kapo kiel penstutaĵo, estas produkto de la pensanta kapo, kiu alproprigas al si la mondon en la sola por ĝi ebla maniero, maniero kiu estas diversa la arta, religia, praktike mensa alproprigo de tiu ĉi

Pensado kaj agado

mondo.

Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42

*

[La dialektiko en sia racia formo] agacas kaj abomenigas la burĝaron kaj ties doktrinajn porparolantojn, ĉar ĝi entenas en la pozitiva kompreno de la ekzistanta samtempe ankaŭ la komprenon de ties negado, de ties nepra pereco, komprenas ĉian estiĝintan formon en la fluo de la movado, do ankaŭ laŭ ĝia mortonta flanko, neniel impreseblas, kaj ĉar ĝi estas esence kritika kaj revolucia.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 28

*

Nun [post la kulmino de la kapitalismo en scienco kaj klasika ekonomio] jam ne temis pri tio ĉu iu aŭ alia teoremo estas vera, sed ĉu ĝi estas utila al la kapitalo aŭ malutila, komforta aŭ malkomforta, ĉu kontraŭa aŭ ne al la polico. La neprofitcelan esploradon anstataŭis pagata parolskermado, la senantaŭjuĝan sciencan esploradon anstataŭis la malbona konscienco kaj la malbona intenco de apologetiko.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 22

*

Pensado kaj estado estas [...] ja *diversaj*, sed samtempe en *unu*ecounu kun la alia. La *formadode* la 5 sensoj estas laboro de la tuta ĝisnuna mondhistorio.

Ökonomisch-philosophische Manuskripte, MEW EB I

La filozofoj nur diverse *interpretis* la mondon, sed necesas *ŝanĝi* ĝin.

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

Tezoj pri Fojerbaĥo, p.9

*

La konscio estas [...] jam komence socia produkto kaj restas tia, tiom longe kiom entute ekzistas homoj.

Die deutsche Ideologie, MEW 3

*

Oni povas distingi la homojn laŭ la konscio, laŭ la religio, laŭ kio ajn alia, disde la bestoj. Tiuj mem ekdistingiĝas disde la bestoj ekde kiam ili komencas *produktisiajn* vivrimedojn.

Die deutsche Ideologie, MEW 3

*

Sed ankaŭ kiam mi agas *science* ktp, agado kiun mi povas plenumi malofte en senpera komuneco kun aliaj, mi agas *socie*, ĉar kiel *homo*. Ne nur la materialo de mia agado – kiel eĉ la lingvo mem per kiu agas la pensanto – estas donita al mi kiel socia produkto, mia *propra* estado *estas* socia agado.

Ökonomisch-philosophische Manuskripte, MEW EB I

*

La neceso kalkuli la periodojn de la Nil-moviĝo kreis la egiptan astronomion kaj kun tiu la regadon de la pastra kasto kiel gvidanto de la kampkulturo.

Das Kapital, MEW 23, 537

*

Pensado kaj agado

Kiel maŝinaro la laborrimedo akiras materian ekzistmanieron kiu kondiĉas la anstataŭigon de homforto per naturfortoj kaj de laŭsperta rutino per konscia aplikado de la naturscienco.

La kapitalo, ĉap. 10-13, p. 96

*

Tiu postulo ŝanĝi la konscion kondukas al la postulo alie interpreti la ekzistanton, do agnoski ĝin per alia interpreto.

Die deutsche Ideologie, MEW 3

*

Ni devas emancipi nin mem antaŭ ol povi emancipi aliajn.

Zur Judenfrage, MEW 1

*

Ne estas la konscio de la homoj kiu determinas ilian eston, sed inverse, ilia socia esto kiu determinas ilian konscion.

Zur Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42

*

Alproprigo, kiu nenion igas propra al si, estas kontraŭdiro en si mem.

Grundrisse der politischen Ökonomie, MEW 42

*

La religia mizero estas unuflanke la esprimo de la reala mizero kaj aliflanke la protesto kontraŭ la reala mizero. La

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

religio estas la suspiro de la premata kreitaĵo, la animstato de senkora mondo, kiel ĝi estas la spirito de senspiritaj kondiĉoj. Ĝi estas la opio de la popolo.

Kritik der Hegelschen Rechtsphilosophie, MEW 1, 378

*

En la religio la homoj faras el sia empiria mondo nur pensatan, imagatan estaĵon, kiu alpaŝas ilin fremde.

Die deutsche Ideologie, MEW 3, 143

*

La homoj faris al si ĝis nun ĉiam malĝustajn ideojn pri si mem, pri tio kio ili estas aŭ estu. Laŭ siaj imagoj pri dio, pri la normalaj homoj ktp ili instalas siajn kondiĉojn. La elkovaĵoj de iliaj kapoj kreskis al ili super la kapon. Ili, la kreintoj, klinis sin antaŭ siaj kreitaĵoj. Ni liberigu ilin el la fantazi-aĵoj, la ideoj, la dogmoj, la imagatajn estaĵojn, sub kies jugo ili pereas. Ni ribelu kontraŭ tiu estrado de la pensoj.

Die deutsche Ideologie, MEW 3, 13

*

La tasko de la filozofio, kiu servas la historion, estas unue, post senmaskigi la sanktan formon de la homa memfremdigo, senmaskigi la memfremdigon en ĝiaj nesanktaj formoj. La kritiko de la ĉielo transformiĝas per tio en la kritikon de la tero, la kritiko de la religio en la kritikon de la juro, la kritiko de la teologio en la kritikon de la politiko.

Zur Kritik der Hegelschen Rechtsphilosophie, Einleitung, MEW 1, 378f.

*

Pensado kaj agado

La filozofio de la ĝuo estis neniam io alia ol la sprita lingvo de certaj al ĝuo privilegiitaj sociaj rondoj. Senrigarde al tio, ke la maniero kaj enhavo de ilia ĝuado estis ĉiam kondiĉita de la tuta formo de la cetera socio kaj suferis je ĉiaj ties kontraŭdiroj, tiu filozofio fariĝis senenhava frazo ekde kiam ĝi pretendis pri ĝenerala karaktero kaj proklamis sin vivkoncepto de la tuta socio.

Ĝi sinkis ĉi tie al edifa moralprediko, al sofista beligo de la ekzistanta socio, aŭ ĝi transformiĝis al sia malo, deklarante ne libervolan askezon ĝuo.

Die deutsche Ideologie, MEW 3, 402

*

La tiel nomata historia evoluo baziĝas entute sur tio, ke la lasta formo konsideras la antaŭajn kiel ŝtupojn al si mem, kaj ĉar ĝi malofte, kaj nur en tute precizaj kondiĉoj, kapablas kritiki sin mem [...], komprenas ilin ĉiam unuflanke.

Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42, 26

*

Tie kie ĉesas la spekulado, en la reala vivo, komencas do la reala, pozitiva scienco, la prezento de la praktika agado, de la praktika evoluado de la homoj. La sensignifaj frazoj pri konscio ĉesas, reala scio devas anstataŭi ilin.

Die deutsche Ideologie, MEW 3, 27

*

La teĥnologio malkaŝas la aktivan sintenon de la homo al la naturo, la senperan produktprocezon de lia vivo, per tio ankaŭ de liaj sociaj vivkondiĉoj kaj de la mensaj ideoj font-

antaj el ili. Eĉ ĉia historio de religio, kiu estas abstraktigita de tiu materia bazo, estas – nekritika. Estas fakte multe pli facile trovi per analizo la profanan kernon de la religiaj nebulaĵoj ol inverse, disvolvi el la ĉiufoje realaj vivkondiĉoj ties ĉieligitajn formojn. La lasta estas la sole materiisma kaj tial scienca metodo. La mankojn de la abstrakte naturscienca materiismo, kiu ekskludas la historian procezon, oni vidas jam el la abstraktaj kaj ideologiaj ideoj de ĝiaj porparolantoj, ekde kiam ili elpaŝas ekster sia speciala fako.

La kapitalo, ĉap. 10-13, p. 80-81, n. 109

*

La teoriaj komunistoj, la solaj kiuj havas la tempon okupiĝi pri la historio, distingiĝas ĝuste per tio, ke ili solaj malkovris la kreadon de la „ĝenerala intereso” fare de individuoj difinitaj kiel „privatuloj” en la tuta historio. Ili scias, ke tiu kontraŭdiro estas nur ŝajna, ĉar la unua flanko, la tiel nomata „ĝenerala”, estas konstante kreata de la alia, la privata intereso, kaj tute ne fariĝas, fronte al ĝi, memstara potenco kun memstara historio.

Die deutsche Ideologie, MEW 3, 229

*

Same kiel la medicinaj miraklistoj kaj miraklaj kuracoj baziĝas sur la nescio pri la leĝoj de la naturo, tiel baziĝas la sociaj miraklistoj kaj miraklaj kuracoj sur la nescio pri la leĝoj de la socia mondo.

Die deutsche Ideologie, MEW 3, 523

*

Ideoj povas neniam konduki trans malnovan mondstaton,

Pensado kaj agado

sed ĉiam nur trans la ideoj de la malnova mondostato. Ideoj povas entute nenion realigi. Por realigi la ideojn necesas la homoj kiuj disponigas praktikan forton.

Die heilige Familie, MEW 2, 126

*

La demando, ĉu la homa pensado havas konkretan verecon - ne estas demando de teorio, sed praktika demando. En la praktiko la homo devas pruvi la veron, do realon kaj povon, la ĉi-flankecon de sia pensado. La disputo pri la realeco aŭ nerealeco de la pensado - kiu estas izolita de la praktiko - estas pure skolastika demando.

Tezoj pri Fojerbaĥo, p. 6

*

Estas la malnova iluzio, ke dependas nur de la bona volo de la homoj por ŝanĝi la ekzistantajn kondiĉojn [...]. Tiu idea leviĝo super la mondon estas la ideologia esprimo de la senpoveco de la filozofoj fronte al la mondo. Sed iliaj ideologiaj fanfaronadoj estas ĉiutage senmaskigitaj kiel mensogoj, fare de la praktiko.

Die deutsche Ideologie, MEW 3, 363

*

La vero estas ĝenerala, ĝi apartenas ne al mi, ĝi apartenas al ĉiuj, ĝi havas min, mi ne havas ĝin. Mia propraĵo estas la *formo*, tiu estas mia spirita individuaĵo, *Le style c'est l'homme*[Ĉe la stilo koneblas la homo].

Bemerkungen über die neueste preussische Zensurinstruktion

*

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

La dominantaj ideoj de iu epoko estis ĉiam nur la ideoj de la dominanta klaso.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW Bd 4, 459)

Homo kaj socio

La homo, tio ne estas abstrakta estaĵo kaŭranta ekster la mondo. La homo, tio estas la *mondo de la homo*, ŝtato, socieco.

Kritik der Hegelschen Rechtsphilosophie, MEW 1

*

Antaŭ ĉio evitendas fiksi la „socion” ree kiel abstraktaĵon fronte al la individuo. La individuo estas la socia estulo.

Ökonomisch-philosophische Manuskripte, MEW EB I 538

*

[La homoj kiel produktantoj komencas] *konduiti aktive*, alproprigi al si certajn aĵojn de la ekstera mondo per ago kaj tiel kontentigi sian bezonon. (Ili do komencas produkti.) Per ripetiĝo de tiu procezo la eco de tiuj aĵoj kontentigi iliajn „bezonojn” enmmoriĝas en ilia cerbo.

Randglossen zu Wagners Lehrbuch der politischen Ökonomie

*

En la socia produktado de sia vivo la homoj eniras certajn, necesajn, de ilia volo sendependajn rilatojn, kiuj kongruas kun certa evoluŝtupo de iliaj materiaj produktadfortoj. La tutaĵo de tiuj produktadrilatoj konsistigas la ekonomian strukturon de la socio, la realan bazon sur kiu leviĝas jura kaj politika superstrukturo, kiun kiu kongruas certaj sociaj konscio-formoj. La produktadmaniero de la materiala vivo kondiĉas la socian, politikan kaj spiritan vivprocezon entute.

Zur Kritik der politischen Ökonomie, Vorwort, MEW 13, 8

*

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

La homo estas plej laŭvorte ζοον πολιτικον [zoon politikon - politika (do „civita”) animalo], ne nur socia animalo, sed animalo kiu nur en la socio povas individuigi.

Einleitung zur Kritik der politischen Ökonomie, MEW 13

*

Estas ĉiufoje la senpera rilato de la proprietuloj de la produktadkondiĉoj al la senperaj produktantoj [...] en kiu ni trovas la plej internan sekreton, la kaŝitan bazon de la tuta socia konstruaĵo kaj tial ankaŭ de la [...] ĉiufoje specifa ŝtatformo.

Das Kapital, MEW 25, 799

*

La profunda hipokriteco de la burĝa civilizacio, kaj la barbareco nedisigebla de ĝi, kuŝas senvuale antaŭ niaj okuloj, ekde kiam ni turnas nian rigardon de la hejmlando, en kiu ili prezentiĝas en respektablaj formoj, al la kolonioj, kie ili montras sin en sia tuta nudeco.

MEW 9, 225

*

La kritiko de la religio finiĝas per la instruo ke la homo estas la plej alta estulo por la homo, do per la kategorio imperativo faligi ĉiajn kondiĉojn en kiuj la homo estas humiligata, forlasita, malestiminda estaĵo.

Kritik der Hegelschen Rechtsphilosophie, MEW 1, 385

Homo kaj socio

*

Ju pli iu dominanta klaso kapablas enpreni en si la plej gravajn homojn de la dominataj klasoj, des pli solida kaj danĝera estas ĝia dominado.

Das Kapital, MEW 25, 614

*

Ĉiu sekvas sian privatan intereson kaj nur sian privatan intereson; kaj per tio servas, sen voli kaj scii tion, la privatajn interesojn de ĉiuj, la ĝeneralajn interesojn.

Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42

*

La materia vivo de la individuoj, kiu tute ne dependas de ilia nura „volo“, ilia produktadmaniero kaj la interŝanĝformo, kiuj kondiĉas sin reciproke, estas la reala bazo de la ŝtato kaj restas tia sur ĉiuj ŝtupoj sur kiuj la divido de la laboro kaj la privata proprieto ankoraŭ necesas, tute sendepende de la volo de la individuoj.

Tiuj realaj kondiĉoj tute ne estas kreitaj de la ŝtatpotenco, ili estas pli ĝuste la ĝin kreanta potenco.

La individuoj regantaj en tiuj kondiĉoj devas, sendepende de tio ke ilia povo devas konsistigi sin kiel ŝtaton, doni al sia volo, difinita de tiuj kondiĉoj, ĝeneralan esprimiĝon kiel ŝtatan volon, kiel leĝon – esprimon, kies enhavo estas ĉiam donita de la kondiĉoj de tiu klaso, kiel plej klare pravas la privata kaj la pun-juro. [...]

La esprimo de tiu volo kondiĉita de iliaj komunaj interesoj estas la leĝo.

Die deutsche Ideologie, MEW 3, 311

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

*

Kaj al tio apartenis tiu stranga malsano, kiu disvastiĝis ekde 1848 sur la tuta kontinento, la parlamenta idiotismo, kiu fiksis la kontaĝitojn en imagitan mondon kaj forrabis de ili ĉian senson, ĉian memoron, ĉian komprenon de la kruda ekstera mondo.

Der 18. Brumaire des Louis Bonaparte, MEW 8, 173

*

La burokrataro estas rondo el kiu neniu povas elsalti. Ĝia hierarĥio estas hierarĥio de scio. La pinto kredas la malsuprajn rondojn kapablaj kompreni la detalojn, dum la malsupraj rondoj kredas la pinton kapabla kompreni la ĝeneralan, kaj tiel ili trompas sin reciproke.

Hegelsches Staatsrecht, MEW 1, 248

*

La homo faras la religion, la religio ne faras la homon. Kaj cetere la religio estas la memkonscio kaj la memsento de la homo kiu sin mem aŭ ankoraŭ ne akiris aŭ jam perdis.

Kritik der Hegelschen Rechtsphilosophie, MEW 1, 378

*

La kapitalisma produktado estas esence kosmopolita kiel la kristanismo. Kristanismo estas do ankaŭ specifa religio de la kapitalo. En ambaŭ validas nur la homo. En si mem la homo valoras tiom malmulte aŭ tiom multe kiel ĉiu alia. En unu [sistemo] ĉio dependas de tio ĉu li havas la kredon, kaj en la alia, ĉu li havas krediton. Tamen aldoniĝas ĉe la unua la difavora elekto. Ĉe la alia la hazardo, ĉu li havas monon

Homo kaj socio

de la familio aŭ ne.

Theorien über den Mehrwert, MEW 26.3, 441f.

*

En la imago [...] la individuoj estas sub la regado de kapitalistoj pli liberaj ol antaŭe, ĉar iliaj vivkondiĉoj estas hazardaj; en realo ili estas kompreneble malpli liberaj, ĉar pli submetitaj al objektiva povo.

Die deutsche Ideologie, MEW 3, 76

*

La pensoj de la dominanta klaso estas en ĉiu epoko la dominantaj pensoj, do la klaso, kiu estas la dominanta *materia* povo de la socio, estas samtempe ĝia dominanta *spirita* povo.

Die deutsche Ideologie, MEW 3, 46

*

La diversa formado de la materia vivo estas kompreneble ĉiufoje dependa de la jam disvolvigitaj bezonoj, kaj la produktado kiel la kontentigo de tiuj bezonoj estas mem historia procezo.

Die deutsche Ideologie, MEW 3, 71

*

La sama rajto estas do ĉi tie [en la unua fazo de la komunisma socio] daŭre - laŭ la principo - burĝa rajto, kvankam principo kaj praktiko jam ne kverelas, dum la interŝanĝo de ekvivalentoj (samaj valoroj) ĉe la varinterŝanĝo ekzistas nur mezume, ne por la unuopa okazo.

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

Malgraŭ tiu progreso tiu sama rajto havas ankoraŭ burĝan limon. La rajto de la produktantoj estas proporcia al iliaj laborliveradoj; la egaleco konsistas en tio, ke oni mezuras per la sama skalo, la laboro.

Sed iu korpe aŭ mense supera al la alia, liveras do en la sama tempo pli da laboro aŭ povas labori dum pli da tempo; kaj la laboro, por servi kiel mezurilo, devas esti mezurata laŭ etendiĝo aŭ intenseco, alie ĝi ĉesus esti mezurilo.

Kritiko de la Gota Programo, p. 25

*

Ĉu ne ĉiu ŝtatŝuldo estas hipoteko trudata al la diligento de tuta popolo, kaj detranĉo de ties libereco? Ĉu ĝi ne estigas socion de nevideblaj tiranoj konataj sub la nomo de publikaj kreditoroj?

MEW 15, 124

*

La cenzuro estas la *oficiala* kritiko; ĝiaj normoj estas kritikaj normoj, kiujn oni do tute ne rajtas fortenti de la kritiko, kun kiu ili metas sin en saman kampon.

Bemerkungen über die neueste preußische Zensurinstruktion

*

Kiam la demokratoj postulas la reguladon de la ŝtatŝuldoj, la laboristoj postulas la ŝtatbankroton.

An die Mitglieder des Kommunistischen Bundes, MEW 7, 253

Homo kaj socio

*

La moderna ŝtatpotenco estas nur komitato, kiu mastrumas la komunajn aferojn de la tuta burĝaro.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4, 464)

*

La burĝaro demetis la aŭreolon de ĉiuj ĝis nun respektindaj kaj ĉiam kun pia timo konsiderataj agadoj. Ĝi transformis la kuraciston, la juriston, la pastron, la poeton, la scienculon en sian pagatan salajrulon.

La burĝaro forŝiris de la familia rilato ties kortuŝe sentimentalan vualon kaj reduktis ĝin al pura monrilato.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4, 7)

Laboro kaj eskpluatado

La laboro estas unue procezo inter homo kaj naturo, procezo, en kiu la homo peras, reguligas kaj kontrolas sian metabolon kun la naturo per sia propra agado.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 207

*

Araneo faras operaciojn similajn al tiuj de teksisto, kaj abelo hontigas per la konstruado de siaj vaksaj ĉeloj multajn homajn konstruistojn. Sed kio principe distingas la plej malbonan konstruiston de la plej bona abelo estas, ke li konstruis la ĉelon en sia kapo antaŭ ol konstrui ĝin per vakso. Fine de la konstruado aperas rezulto, kiu ĉe ĝia komenco estis jam en la ideo de la laboristo, do ekzistis jam ideo. Li ne realigas nur formŝanĝon de io natura; li realigas en tio natura samtempe sian celon, kiun li scias, kiu determinas la manieron de lia ago kiel leĝon kaj al kiu li devas submeti sian volon.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 208

*

[La laboristo] uzas la meĥanikajn, fizikajn, ĥemiajn ecojn de la aĵoj, por igi ilin efiki kiel povorimedoj sur aliajn aĵojn, laŭ lia celo. [...] La saman gravecon, kiun havas la strukturo de ostaj restaĵoj por la ekkono de la organiziĝo de pereintaj animal-generacioj, havas la postrestaĵoj de laborrimedoj por pritakso de pereintaj ekonomiaj soci-formoj. Ne *kio* fariĝas, sed *kiel*, per kiuj laborrimedoj io fariĝas, distingas la ekonomiajn epokojn. La laborrimedoj estas ne nur gradmezuriloj

Laboro kaj eskpluatado

de la evoluo de la homa laborforto, sed ankaŭ montriloj por la sociaj rilatoj, en kiuj oni laboras. (*Kursivigoj de la tradukinto*)

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 209

*

Ĉia laboro estas unuflanke elspezo de homa laborforto en korpa senco, kaj en tiu eco de sama homa aŭ abstrakte homa laboro ĝi formas la varvaloron. Ĉia laboro estas unuflanke elspezo de homa laborforto en aparta laŭcela formo, kaj en tiu eco de konkreta utila laboro ĝi produktas uzvalorojn.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 60

*

[La homoj] produktas nur per tio ke ili kunagas en certa maniero kaj interŝanĝas siajn agadojn reciproke. Por produkti, ili eniras en certajn rilatojn kaj kondiĉojn inter si, kaj nur ene de tiuj sociaj rilatoj kaj kondiĉoj okazas ilia efikado sur la naturo, okazas la produktado.

Dunglaboro kaj kapitalo, p. 18

*

Ju malpli da tempo la socio bezonas por produkti tritikon, brutaron ktp, des pli da tempo ĝi gajnas por alia produktado, materia aŭ spirita. Kiel ĉe unuopa individuo, la tutflankeco de ĝia evoluo, de ĝia ĝuado kaj de ĝia agado dependas de tempoŝparo. [...] Ekonomio de tempo, en tiu solviĝas fine ĉia ekonomio.

Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

*

Sed libera tempo, disponebla tempo, estas la riĉaĵo mem – parte por ĝui la produktojn, parte por libera agado, kiu ne kiel la laboro estas difinita per devigo de alia celo plenumenda, kies plenumado estas naturnepreco aŭ socia devo, kiel ajn.

Theorien über den Mehrwert, MEW 26.3, 253

*

Vera riĉaĵo [estas] tempo, kiu ne estas sorbita de senpera produkta laboro, sed donas spacon al ĝuado, al libertempo, tiel al libera agado kaj disvolviĝo.

Theorien über den Mehrwert, MEW 26.3, 252

*

Konsiderata en konstanta kunteksto kaj en la konstanta fluo de siaj renoviĝoj, ĉia socia produktadprocezo estas [...] samtempe reproduktad-procezo.

Das Kapital, MEW 23, 591

*

Estas nedubebla fakto, ke la maŝinaro en si mem ne respondecas pri la „liberigo” de laboristoj je vivrimedoj. Ĝi malplikostigas kaj pliiĝas la produkton en la branĉo, kiun ĝi koncernas, kaj lasas la amason da vivrimedoj produktitaj en aliaj industribranĉoj unue senŝanĝa. Post kiel antaŭ ĝia enkonduko la socio posedas do same aŭ pli multajn vivrimedojn por la delokitaj laboristoj, tute sendepende de la eksterordinara parto de la jara produkto kiu estas malŝparata de la nelaboristoj. Kaj jen la pinto de la ekonomia

Laboro kaj eskpluatado

apologetiko!

La kontraŭdiroj kaj antagonismoj, ne disigeblaj de la kapitalisma aplikado de la maŝinaro, ne ekzistas ĉar ĝi ne elkreskas el la maŝinaro mem, sed el ĝia kapitalisma aplikado! Ĉar do la maŝinaro, konsiderata kiel tia, mallongigas la labortempon, dum ĝi kapitalisme aplikate longigas la labortagon, per si mem plifaciligas la laboron, kapitalisme aplikate altigas ties intensecon, per si mem estas venko de la homo super la naturforto, kapitalisme aplikate subjugas la homon sub la naturforton, per si mem pliigas la riĉaĵon de la produktanto, kapitalisme aplikate malriĉigas lin ktp, la burĝa ekonomikisto deklaras simple ke ĉiuj ĉi evidentaj kontraŭdiroj estas nur ŝajno de la ordinara realeco, sed per si mem, do ankaŭ en la teorio, tute ne ekzistas. Tiel li ŝparas al si ĉian pluan kaprompiĝon kaj krome taskas al sia kontraŭulo la stultaĵon ne kontraŭbatali la kapitalisman aplikadon de la maŝinaro, sed la maŝinaron mem.

La kapitalo, ĉap. 10-13, p. 162-163

*

La valoro de la laborforto, same kiel tiu de ĉia alia varo, estas determinata per la labortempo necesa por la produktado, do ankaŭ reproduktado, de tiu specifa artiklo.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 199

*

Se la prezo de la laborforto falas al tiu minimumo [ekzist-minimumo], tiam ĝi falas sub ĝian valoron, ĉar ĝi [la laborforto] povas tiel konserviĝi kaj disvolviĝi nur en mizera formo.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 202

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

*

Nur la formo en kiu oni deprenas tiun plusvaloron de la rekta produktanto, la laboristo, distingas la ekonomiajn soci-ordojn, ekz-e la socion de sklavismo disde tiu de la dunglaboro.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 251

*

Kiam la ekspluatado de la laboristo fare de la fabrikisto haltas, kiam li ricevas sian salajron kontante, tiam la ceteraj partoj de la burĝaro atakas lin, la domposedanto, la komercisto, la lombardisto ktp.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4, 469)

*

Same kiel en la urba industrio, tiel en la moderna kamp-kulturo la kreskinta produktadforto kaj pli granda fluigo de la laboro estas aĉetata per detruado kaj elĉerpigo de la laborforto mem. Kaj ĉia progreso de la kapitalisma terkulturo estas ne nur progreso en la arto prirabi la laboriston, sed ankaŭ en la arto prirabi la grundon, ĉia progreso en kresko de ĝia fekundeco por donita tempo estas samtempe progreso en ruinigo de la konstantaj fontoj de tiu fekundeco.

Das Kapital, MEW 23, 529

Laboro kaj eskpluatado

*

[Dungosalajro estas] ne tio [...] kio ĝi *ŝajnas* esti, nome la *valoro*, respektive *prezo de la laboro*, sed nur maskita formo de la *valoro*, respektive *prezo de la laborforto*.

Kritiko de la Gotaa Programo, p. 32

*

La *sklavo* ne vendis sian laborforton al la sklavposedanto, same kiel la bovo ne vendas siajn fortojn al la kampulo. La sklavo kune kun sia laborforto estas unu fojon por ĉiam vendita al lia proprietulo.

Dunglaboro kaj kapitalo, p. 10

*

Do, laŭ la sama mezuro, laŭ kiu la laboro fariĝas pli mal-kontentiga, pli abomena, laŭ la sama mezuro pliiĝas la konkurenco kaj malpliiĝas la salajro. La laboristo provas konservi la kvanton de sia salajro per tio ke li laboras pli, ĉu per laborado dum pli da horoj, ĉu per tio ke li liveras pli en la sama horo. Pelata de la mizero, li do ankoraŭ pliiĝas la jam malfeliĉigajn efikojn de la labordivido. La rezulto estas: Ju pli li laboras, des malpli da salajro li ricevas, kaj tio pro la simpla kialo ke li sammezure konkurencas siajn kunlaborantojn, faras do el siaj kunlaborantoj same multajn konkurantojn, kiuj ofertas sin je la samaj malbonaj kondiĉoj kiel li mem, ĉar li do lastinstance *konkurencas sin mem, sin mem kiel membron de la laborista klaso.*

Dunglaboro kaj kapitalo, p. 35

*

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

En la burĝa socio la viva laboro estas nur rimedo pliigi la amasigitan laboron. En la komunisma socio la amasigita laboro estas nur rimedo por ampleksigi, riĉigi, subteni la vivprocezon de la laboristoj. En la burĝa socio regas do la pasinteco super la estanteco, en la komunisma la estanteco super la estinteco. En la burĝa socio la kapitalo estas memstara kaj persona, dum la aganta individuo estas nememstara kaj nepersona.

Kaj la nuligon de tiu rilato la burĝaro nomas nuligo de personeco kaj de libereco! Kaj prave. Temas tamen pri la nuligo de la burĝaj personeco, memstareco kaj libereco.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4, 476)

*

Tiu antagonismo inter moderna industrio kaj scienco unuflanke kaj moderna mizero kaj pereco aliflanke, tiu antagonismo inter la produktadfortoj kaj la sociaj rilatoj de nia epoko estas evidenta, impresa kaj nerefutebla fakto.

Rede auf der Jahresfeier des "People's Paper" am 14. April 1856 in London, MEW 12, 3-4

*

Anstataŭ la malnovaj, per enlandaj produktoj kontentigitaj bezonoj aperas novaj, kiuj postulas la produktojn de la plej malproksimaj landoj kaj klimatoj por sia kontentigo. Anstataŭ la malnovaj lokaj kaj naciaj memsufiĉeco kaj fermiteco aperas ĉiufanka interŝanĝo, ĉiufanka reciproka dependeco de la nacioj. Kaj kiel la materia, tiel ankaŭ la spirita produktado.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4, 466)

Laboro kaj eskpluatado

*

La interesoj de la kapitalo kaj la interesoj de la laboro estas la samaj, tio signifas nur: kapitalo kaj dunglaboro estas du flankoj de unu sama rilato. Unu kondiĉas la alian, kiel la uzuristo kaj la disipanto kondiĉas sin reciproke.

Dunglaboro kaj kapitalo, p. 23

*

La akumulado de riĉaĵo ĉe unu poluso estas do samtempe akumulado de mizero, laborturmento, sklaveco, nesciado, brutaliĝo kaj morala difektiĝo ĉe la kontraŭa poluso, do ĉe tiu klaso kiu produktas sian propran produkton kiel kapitalon.

Das Kapital, MEW 23, 674-675

*

Nu, la riĉaĵo estas unuflanke aĵo, realigita en aĵoj, materialaj produktoj, fronte al kiuj la homo staras kiel subjekto; aliflanke kiel valoro ĝi estas nura komando super fremda laboro.

Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42, 387

*

Produktiva laboristo estas laboristo kiu produktas fremdan riĉaĵon. Nur kiel tia produktinstrumento por fremda riĉaĵo lia ekzistado havas sencon.

Theorien über den Mehrwert, MEW 16.1, 196

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

La protestantismo ludas jam per sia transformado de preskaŭ ĉiuj tradiciaj festotagoj gravan rolon en la genezo de la kapitalo.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 319, noto 2

*

Libereco! Ĉar aĉetanto kaj vendisto [...] de la laborforto estas movataj nur de sia libera volo. Ili faras la kontrakton kiel liberaj, jure samrajtaj personoj. La laborkontrakto estas la fina rezulto, en kiu iliaj voloĵoj donas al si komunan juran esprimiĝon. Egaleco! Ĉar ili rilatas reciproke nur kiel varposedantoj kaj interŝanĝas saman valoron (laborforton) kontraŭ saman valoron (salajron).

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 205-206

*

La laboristoj estas admonataj ŝpari [...], tiel ke ili dum maljuneco, aŭ kiam intervenas malsanoj, krizoj ktp, ne estu la ŝarĝo de malriĉulejoj, de la ŝtato, de la almozulejo (unuverte de la laborista klaso mem kaj precize ne de la kapitalistoj) kaj ne vivetu per ties poŝo, do ŝpari por la kapitalistoj; siajn produktadokostojn por tiuj malpliigi.

Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42, 196

*

Sen konsideri detalajn esceptojn, la ĝeneralaj movoj de la dungosalajro estas ekskluzive regulataj de la pligrandiĝo aŭ malpligrandiĝo de la industria armeo de senlaboruloj, kiuj respondas al la periodŝanĝiĝo de la industria ciklo.

Ili do ne estas determinataj de la moviĝo de la absoluta

Laboro kaj eskpluatado

nombro de la laborista loĝantaro, sed per la ŝanĝiganta rilato, en kiu la laborista klaso dividiĝas en aktiva armeo kaj rezerva armeo, per la grado, en kiu ĝi estas jen sorbita, jen denove elŝovita.

Das Kapital, MEW 23, 666

*

La industria rezerva armeo premas dum la periodoj de stagnado kaj meza prospero sur la aktivan laboristan armeon kaj, dum la periodo de superproduktado kaj de superstreĉo, bridas ĝin. La relativa laboristo-troo estas do la fono sur kiu moviĝas la leĝo de postulo kaj provizo je laboro.

Das Kapital, MEW 23, 669

*

La vorto superproduktado en si mem erarigas. Tiom longe, kiom la plej urĝaj bezonoj de granda parto de la socio ne estas kontentigitaj aŭ nur ĝiaj plej rektaj bezonoj, oni kompreneble tute ne povas paroli pri superproduktado de produktoj - en la senco, ke la amaso de la produktoj estus superflua kompare kun la bezonoj je ili. Inverse direndas, ke surbaze de la kapitalisma produktado en tiu senco oni konstante subproduktas.

La baro de la produktado estas la profito de la kapitalistoj, tute ne la bezono de la produktantoj.

Theorien über den Mehrwert, MEW, 26.2, 528

*

Ĉia produktado estas alproprigo de la naturo flanke de la

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

individuo ene kaj pere de certa sociformo. Tiusence estas banalaĵo diri ke proprieto (alproprigo) estas kondiĉo de la produktado.

Sed estas ridinde salti de tio al certa formo de proprieto, ekz-e la privata proprieto. *Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42*

*

La kapitalo, senlace strebanta al la ĝenerala formo de riĉaĵo (do al la mono), pelas [...] la laboron trans la limojn de sia naturbezoneco kaj tiel kreas la materiajn elementojn por la disvolvado de la riĉa individueco, kiu estas same ĉiuflanka en sia produktado kiel en sia konsumado.

Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW, 42, 231

*

En manufakturo kaj metio la laboristo uzas instrumenton, en la fabriko li servas maŝinon.

La kapitalo, ĉap. 10-13, p. 139

*

La rajto je laboro estas en la burĝa senco kontraŭdiro, mizera, vana deziro.

Klassenkämpfe in Frankreich, MEW 7, 42

Kapitalo kaj profito

Se la mono, laŭ Aŭgiero, „surmondiĝas kun naturaj sangomakuloj sur unu vango”, tiel la kapitalo de kapo ĝis piedo, el ĉiuj poroj, sango- kaj koto-plene.

Das Kapital, MEW 23, 788

*

Egala ekspluatado de la laborforto estas la unua homrajto de la kapitalo.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 338

*

Ke la kapitalistoj, kiuj tiom kriegis kontraŭ la „rajto je laboro”, nun ĉie postulas de la registaro subtenon [...], do invokas la „rajton je profito” koste de la ŝtato, estas bele.

Markso al Engelso, 1857-12-08, MEW, 29, 229

*

La intereso de la kapitalisto kaj de la laboristo estas do la sama, asertas la kapitalistoj kaj ties ekonomikistoj. Kaj efektive! La laboristo pereas, se la kapitalo ne dungas lin. La kapitalo pereas, se ĝi ne ekspluatas la laborforton, kaj por ekspluati ĝin, ĝi devas ĝin aĉeti.

Dunlaboro kaj kapitalo, p. 22

*

Por la transformado de mono en kapitalon, la monposedanto devas do trovi la liberan laboriston en la varmerkato, liberan en la duobla senco, ke li disponas pri sia laborforto

kiel libera persono, ke li aliflanke ne havas aliajn varojn por vendi, estas sen io ajn, estas libera de ĉiaj aferoj necesaj por realigo de sia laborforto.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 197

*

Same kiel la nepagata laboro de la laboristo kreas al la produktiva kapitalo rekte plusvaloron, tiel la nepagata laboro de la komerca laboristo estigas al la komerca kapitalo parton de tiu plusvaloro.

Das Kapital, MEW 25, 305

*

La burĝaro, kie ĝi akiris la potencon, detruis ĉiajn feŭdajn, patriarkajn, idiliajn rilatojn. Ĝi senkompatate disŝiris la buntajn feŭdajn ligilojn, kiuj ligis la homon al lia natura superulo, kaj lasis nenian alian ligan inter homo kaj homo krom la nudan memintereson, krom la senaniman kontantan monpagon.

La sanktajn tremojn de pia ekstazo, de kavalira entuziasmo, de filistra sentimentaleco ĝi dronigis en la glacian akvon de la egoisma kalkulado. Ĝi dissolvis la personan dignon en la interŝanĝvaloron kaj metis sur la lokon de sennombraj kaj leĝe garantiitaj kaj bone akiritaj liberecoj la unusolan senskrupulan agadliberecon. Unuvorte, sur la lokon de ekspluatado vualitan per religiaj kaj politikaj iluzioj, ĝi metis la ekspluatadon malkaŝan, impertinentan, rektan, brutalan. [...]

La burĝaro malkaŝis, kiel la brutala fortomontro, kiun la reakcio tiom admiras ĉe la mezepoko, trovis sian konvenan kompletigon en la plej inerta maldiligentado. Ĝi estis la

Kapitalo kaj profito

unua kiu pruvis, kiom kapablas fari la agado de la homo. Ĝi realigis mirindaĵojn kiuj superas la egiptajn piramidojn, romiajn akvoduktojn kaj gotikajn katedralojn. Ĝi faris ekspediciojn multe pli grandajn ol la popolmigradoj kaj krucmilitoj.

*Manifesto de la Komunista Partio, trad. Detlev Blanke, E-libro p. 38-39
(Manifest der Kommunistischen Partei, MEW 4, 464)*

*

La kapitalisto povas [sub kondiĉoj de tempa salajroj] elpremi certan kvanton da pluslaboro el la laboristo, sen disponigi al li la labortempon necesan por lia vivteniĝo. Li povas neniiĝi ĉian regularecon de la dungo kaj tute laŭ sia komforto, arbitreco kaj momentaj interesoj alternigi la plej monstran kromlaboron kun relativa aŭ tuta senlaboreco.

Das Kapital, MEW 23, 568

*

Tiom longe, kiom la produktado laŭ kapitalo ŝajnas esti la necesa, do la plej taŭga formo por la disvolviĝo de la socia produktoforto, tiom longe la moviĝo de la individuoj ene de la puraj kondiĉoj de la kapitalo ŝajnas esti ilia libereco.

Grundrisse der Kritik de politischen Ökonomie, MEW 42, 544

*

[La merito de la klasikaj ekonomikistoj estas,] ke ili esploris la kuntekston de la burĝaj produktad-rilatoj kontraste al la vulgarekonomio, kiu vagadas nur ene de la ŝajna kunteniĝo.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 98

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

*

La vulgarekonomio faras fakte nenion alian ol doktrine traduki, sistemigi kaj defendi la imagojn de la agentoj de la burĝa produktado.

Das Kapital, MEW 25, 825

*

Ĉe la foriro el tiu sfero de simpla cirkulado aŭ de var-interŝanĝo, el kiu la vulgara liberkomercisto depruntas ideojn, nociojn kaj mezurilojn por sia juĝo pri la socio de kapitalo kaj dungolaboro, la fizionomio de niaj roluloj ŝajne jam iom ŝanĝiĝas. La iama monposedanto progresas kiel kapitalisto, la posedanto de laborforto sekvas lin kiel ties laboristo; la unua signife subridetante kaj komerce diligenta, la alia timema, rezistema, kiel iu kiu merkate vendis sian propran haŭton kaj devas nun atendi nenion alian ol la - tanejon.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 206

*

La praaj naciaj industrioj estas neniigitaj kaj estas ankoraŭ daŭre neniigataj. Ili estas forigataj de novaj industrioj, kies enkonduko fariĝas vivgrava demando por ĉiuj civilizitaj nacioj, per industrioj, kiuj prilaboras jam ne enlandajn krudmaterialojn, sed krudmaterialojn apartenantajn al la plej foraj zonoj kaj kies fabrikaĵoj estas konsumataj ne nur en la lando mem, sed en ĉiuj mondpartoj samtempe.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4, 466)

Kapitalo kaj profito

*

Ĉiuj kontraŭdiroj de la burĝa produktado eksplodas kolektive en la ĝeneralaj mondmerkataj krizoj, en la apartaj krizoj (apartaj laŭ la enhavo kaj la etendiĝo) nur unuope, izolite, unuflanke.

Theorien über den Mehrwert, MEW 26.2, 535

*

Kiel la superproduktado entute rilatas kun la absolutaj bezonoj? Ĝi rilatas nur kun la pagipovaj bezonoj. Ne temas pri absoluta troproduktado - troproduktado en si mem en rilato al la absoluta bezoneco aŭ la deziro posedi la varojn. Tiusence ekzistas nek parta nek ĝenerala superproduktado.

Theorien über den Mehrwert, MEW 26.2, 507

*

Kie homo sen riĉaĵo ricevas krediton kiel industriisto aŭ komercisto, tio okazas en la konfido, ke li funkcios kiel kapitalisto, alpropriligos al si nepagatan laboron per la pruntita kapitalo. Li ricevas krediton kiel ebla kapitalisto.

Kaj tiu cirkonstanco [...], ke homo sen riĉaĵo, sed kun energio, solideco, kapablo kaj komercaj konoj povas tiel transformiĝi en kapitaliston [...], fortigas la dominadon de la kapitalo mem, etendas ĝian bazon kaj ebligas al ĝi rekrutiĝi konstante per novaj fortoj el la socia subtavolo. Tute same kiel la cirkonstanco, ke la katolika eklezio en la mezepoko formis sian hierarkion, senkonsidere al socia stato, denaska situacio, posedaĵo, el la plej bonaj kapoj de la popolo, estis ĉefa rimedo de firmiĝo de la pastra potenco kaj subpremado de la laikoj.

Das Kapital, MEW 25, 614

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

*

La kapitalisma produktado [moviĝas] en certaj periodaj cikloj. Ĝi spertas unu post la alia la staton de trankvilo, de kreskanta vigliĝo, prospero, superproduktado, krizo kaj stagnado. La merkaptoprezoj de la varoj kaj la merkatojvotoj de la profito sekvas tiujn fazojn, foje falante sub sian mezumon, foje leviĝante super ĝin. [...] Dum la fazo de falantaj merkaptoprezoj, same kiel dum la fazoj de krizo kaj de stagnado, la laboristo, se li ne estas ĵetita sur la pavimonton, atendas malaltiĝon de sia salajro. [...]

Se li ne batalis jam en la prospero-fazo, dum fariĝis kromprofitoj, por salajro-altigo, li atingus en la mezumo de industria ciklo eĉ ne sian mezuman salajron aŭ la valoron de sia laboro. Estas la pinto de absurdo postuli, ke, dum lia salajro neeviteble suferis pro la malfavoraj fazoj de la ciklo, li rezignu kompensi tion dum la prosperofazo.

Salajro, prezo kaj profito, p. 52

*

La cirkvitoj de la individuaj kapitaloj implikiĝas [...] unu en la alian, antaŭkondiĉas kaj kondiĉas sin reciproke, kaj ĝuste en tiu interligiteco ili konsistiĝas la socian ĉiomkapitalon.

Das Kapital, MEW 24, 353s

*

La sola parto de la tiel nomata nacia riĉaĵo, kiu reale eniras en la tutan posedon de la modernaj popoloj, estas – ilia ŝtatŝuldo.

Das Kapital, MEW 23, 782

Kapitalo kaj profito

*

La kapitalisma alproprigomaniero, kiu fontas en la kapitalisma produktadmaniero, do la kapitalisma proprieto, estas la unua negacio de la individua privatproprieto bazita sur propra laboro. Sed la kapitalisma produktado produktas kun la nepreco de naturprocezo sian propran negacion. Ĝi estas la negacio de la negacio. Tiu ne restarigas la privatan proprieton, sed ja la individuan proprieton surbaze de la atingoj de la kapitalisma erao: tiu de kooperado kaj de komuna posedo de la tero kaj de la produktadrimedoj produktitaj de la laboro mem.

Das Kapital, MEW 23, 791

*

La krizoj estas ĉiam nur momentaj perfortaj solvoj de la ekzistantaj kontraŭdiroj, perfortaj erupcioj, kiuj restarigas por la momento la difektitan ekvilibron.

Das Kapital, MEW 25, 259

*

La giganta produktoforto - proporcie al la loĝantaro -, kiu evoluis ene de la kapitalisma produktadmaniero kaj, kvankam ne samproporcie, la kresko de la kapitalvaloroj (ne nur de ilia materia substrato), kiuj kreskas multe pli rapide ol la loĝantaro, kontraŭdiras la ĉiam pli mallarĝiĝantan bazon, relative al la riĉaĵo, por kiu tiu giganta produktoforto efikas, kaj la valorigokondiĉojn de tiu ŝvelanta kapitalo. Pro tio la krizoj.

Das Kapital, MEW 25, 277

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

*

La kapitalmonopolo fariĝas malhelpo de la produktadmaniero kiu ekfloris sub ĝi. La centralizo de la produktadrimedoj kaj la sociigo de la laboro atingas punkton, kie ili fariĝas malkongruaj kun sia kapitalisma ŝelo. Tiu estas krevigota. Sonas la horo de la kapitalisma privatproprietio. La ekspropriigantoj estas ekspropriigataj.

Das Kapital, MEW 23, 791

*

[La manufakturo] kripligas la laboriston al monstraĵo, per tio ke ĝi forceje subtenas lian detalan talenton per subpremado de mondo da produktivaj emoj kaj talentoj, same kiel oni en la La-Plato-ŝtatoj buĉas tutan beston por predi ties felon aŭ ties sebon.

La kapitalo, ĉap. 10-13, p. 68

*

La manufaktureca labordivido [...] produktas novajn kondiĉojn de la dominado de la kapitalo super la laboro. Se ĝi aperas do unuflanke kiel historia progreso kaj necesa evolumento en la ekonomia formiĝoprocezo de la socio, ĝi aperas aliflanke kiel rimedo de civilizita kaj rafinita ekspluatado.

La kapitalo, ĉap. 10-13, p. 73

*

Produktado de plusvaloro aŭ plusfarado estas la absoluta leĝo de tiu produktadmaniero [de kapitalismo].

Das Kapital, MEW 23, 647

Kapitalo kaj profito

*

La kapitalo estas mortinta laboro, kiu nur vampire reviviĝas per ensuĉado de viva laboro, kaj vivas des pli, ju pli da ĝi ĝi ensuĉas.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 269

*

La kapitalisma produktadprocezo reproduktas [...] per sia propra agado la dividon inter laborforto kaj laborkondiĉoj. Ĝi reproduktas kaj eternigas per tio la ekspluadkondiĉojn de la laboristo. Ĝi devigas konstante la laboriston vendi sian laborforton por vivi, kaj kapabligas konstante la kapitaliston aĉeti ĝin por riĉiĝi. Jam ne estas la hazardo, kiu metas kapitaliston kaj laboriston kiel aĉetanton kaj vendanton unu vidalvide de la alia en la varmerkaton. Estas la truda situacio de la procezo mem, kiu ĉiam reĵetas iun kiel vendiston de sia laborforto sur la varmerkaton kaj transformas lian propran produkton konstante en la aĉetrimedon de la alia. Fakte la laboristo apartenas al la kapitalo, antaŭ ol li vendas sin al la kapitalisto.

Das Kapital, MEW 23, 603

*

Ju pli granda la socia riĉaĵo, la funkcianta kapitalo, amplekso kaj energio de ĝia kresko, do ankaŭ la absoluta grando de la proletaro kaj la produktivo de ĝia laboro, des pli granda estas la industria rezervoarmeo [...]. La relativa grando de la industria rezervarmeo kreskas do kun la potencoj de la riĉaĵo. Sed ju pli granda tiu rezervarmeo proporcie al la aktiva laborist-armeo, des pli amasa [estas] la solidiĝinta troloĝantaro, kies mizero estas en inversa

proporcio al ĝia laborturmento. Ju pli granda fine la almozula tavolo de la laborista klaso kaj la industria rezervoarmeo, des pli granda [estas] la oficiala paŭperismo. *Tio estas la absoluta, ĝenerala leĝo de la kapitalisma akumulado.*

Das Kapital, MEW 23, 673-674

*

La industria kapitalo estas la sola estmaniero de la kapitalo, en kiu ne nur alproprigo de plusvaloro, respektive plusprodukto, sed samtempe ties kreado estas funkcio de la kapitalo. Pro tio ĝi kondiĉas la kapitalisman karakteron de la produktado; ĝia ekzisto enkludas la klasan kontraŭecon de kapitalistoj kaj salajrolaboristoj.

Das Kapital, MEW 24, 61

*

Por la kapitalo [...] ne nepre validas la leĝo de pliĝinta produktivo de la laboro. Por la kapitalo tiu produktivo pliĝas, kiam ĝi ŝparas ne entute je viva laboro, sed nur je la *pagataparto* de la viva laboro pli ol ĝi aldonas da pasinta laboro.

Das Kapital, MEW 25, 272

*

[La] tuta evoluo de la moderna industrio devas klini la pesiltason ĉiam pli favore al la kapitalisto kaj kontraŭ la laboriston kaj [...] estas do la ĝenerala tendenco de la kapitalisma produktado ne altigi la mezuman salajronivelon, sed malaltigi ĝin aŭ premi la *valoron de la laboro* pli aŭ malpli ĝis ĝia *minimuma limo*.

Salajro, prezo kaj profito, p. 58

Kapitalo kaj profito

*

La reala grandodiferenco inter profito kaj plusvaloro [...] en la apartaj produktsferoj komplete kaŝas la veran naturon kaj la devenon de la profito, ne nur por la kapitalisto, kiu havas ĉi tie apartan intereson trompiĝi, sed ankaŭ por la laboristo. Per la transformiĝo de la valoroj en produktadprezojn la bazo de la valordifino mem foriĝas el la vido.

Das Kapital, MEW 25, 177s

*

La kapitalisma produktmaniero [...] baziĝas sur tio ke la konkretaj produktadkondiĉoj estas donita al nelaboristoj en formo de kapitalproprietulo kaj grundproprietulo, dum la amaso estas nur proprietulo de sia persona produktadkondiĉo, la laborforto.

Kritiko de la Gota Programo, p. 26

*

La ekonomia karaktermasko de la kapitalisto alkroĉiĝas fikse al homo nur per tio, ke lia mono funkcias konstante kiel kapitalo.

Das Kapital, MEW 23, 591

*

Por socio de varproduktantoj, kies ĝenerale socia produktadrilato konsistas en tio, kondukti al siaj produktoj kiel al varoj, do kiel valoroj, kaj en tiu aĵa formo rilatigi siajn privatajn laborojn unu al la alia kiel saman homan laboron, la kristana religio kun sia kulto de la abstrakta homo, nome en ties burĝa evoluo, la protestantismo, deismo ktp, estas la

plej kongrua religia formo.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 96

*

La akciaj entreprenoj entute – evoluantaj kun la kreditsistemo – havas la tendencon pli kaj pli disigi tiun administran laboron disde la posedo de kapitalo, ĉu de propra aŭ de pruntita; tutsame kiel kun la evoluo de la burĝa socio la juĝaj kaj administraj funkcioj disiĝas de la grundproprietulo, kies atributoj ili estis en la feŭda erao.

Sed per tio ke al la nura proprietulo de kapitalo, la monkapitalisto, alpaŝas la funkcianta kapitalisto, kaj ke kun la kredito tiu monkapitalo alprenas mem socian karakteron, estas koncentrita en bankoj kaj alpruntata de tiuj kaj jam ne de la rekta proprietulo; per tio ke aliflanke la nura direktisto, kiu ne posedas la kapitalon sub ia ajn titolo, nek prunte nek alie, plenumas ĉiujn realajn funkciojn de funkcianta kapitalisto, do restas nur la funkciulo, kaj la kapitalisto malaperas komplete kiel troa persono el la produktadprocezo.

Das Kapital, MEW 25, 401

*

La mezuma profito de la unuopa kapitalisto, aŭ de ĉiu aparta kapitalo, [estas determinata] ne per la pluslaboro, kiun tiu kapitalo alproprigas unue, sed per la kvanto da tuta pluslaboro, kiun la tuta kapitalo alproprigas kaj de kiu ĉiu aparta kapitalo tiras sian dividendon nur kiel proporcia parto de la tuta kapitalo. Tiu socia karaktero de la kapitalo estas perata kaj komplete realigata nur per la plena disvolvigo de la kredit- kaj bank-sistemo.

Kapitalo kaj profito

Per la banksistemo, la disdonado de la kapitalo estas forigita el la manoj de la privataj kapitalistoj kaj de uzuristoj, kiel aparta negoco, kiel socia funkcio. Sed banko kaj kredito fariĝas per tio la plej forta rimedo peli la kapitalisman produktadon trans ĝiajn limojn, kaj unu el la plej efikaj vehikloj de la krizoj kaj de la trompo.

La banksistemo montras krome, per la substituado de diversaj formoj de cirkulanta kredito anstataŭ mono, ke la mono estas fakte nenio alia ol aparta esprimo de la socia karaktero de la laboro kaj de ĝiaj produktoj, kiu devas tamen prezenti sin, kontraste al la bazo de la privata produktado, ĉiam lastinstance kiel aĵo, kiel aparta varo apud aliaj varoj.

Das Kapital, MEW 25, 620-621

*

Kiam kapitalo estas sendata eksterlanden, tio ne okazas ĉar ĝi tute ne aplikeblas enlande. Ĝi okazas, ĉar ĝi aplikeblas eksterlande por pli alta profitkvoto.

Das Kapital, MEW 25, 266

*

La burĝaro, per la ekspluatado de la mondmunkato, tutmondigis la produktadon kaj konsumadon de ĉiuj landoj. Je granda bedaŭro de la reakciuloj ĝi fortiris la nacian grundon el sub la piedoj de la industrio.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 40

*

La burĝaro tiras ĉiujn naciojn, ankaŭ la plej barbarajn, en la civilizacion per la rapida plibonigo de ĉiuj produktadins-

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

trumentoj, per la senfine plifacilita komunikado. La malaltaj prezoj de ĝiaj varoj estas la peza artilerio, per kiu ĝi teren disbatas ĉiujn ĉinajn murojn, per kiu ĝi devigas al kapitulaco la plej obstinan kontraŭfremdulan malamon de la barbaroj.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 41

*

Manenmane kun la centralizo aŭ eksproprieto de multaj kapitalistoj fare de malmultaj, disvolviĝas la koopera formo de la laborprocezo en ĉiam kreskanta skalo, la planita ekspluatado de la tero, la transformado de la laborrimedoj en nur komune uzeblajn laborrimedojn, la ekonomiigo de ĉiaj produktadrimedoj per ilia uzado kiel produktadrimedoj de kombinita, socia laboro, la forvorado de ĉiuj popoloj en la reton de la mondmerkato kaj per tio la internacia karaktero de la kapitalisma reĝimo.

Das Kapital, MEW 23, 790-791

*

La kapitalo estas do la regpovo super la laboro kaj ties produktoj. La kapitalisto posedas tiun potencon, ne pro siaj personaj aŭ homaj ecoj, sed tiomgrade kiom li estas proprieto de la kapitalo.

Ökonomisch-philosophische Manuskripte, MEW EB I, 484

*

Ju pli rapide [...] pliiĝas la produktiva kapitalo, do ju pli floras la industrio, ju pli la burĝaro riĉiĝas, ju pli bonas la komerco, des pli da laboristoj bezonas la kapitaliston, des pli altpreze vendiĝas la laboristo.

Kapitalo kaj profito

La nepra kondiĉo por akceptebla situacio de la laboristo *estas do kiom eble plej rapida kresko de la produktiva kapitalo.*

Sed kio estas kresko de la produktiva kapitalo? Kresko de la amasigita laboro super la viva laboro. Kresko de la domonado de la burĝaro super la laboranta klaso.

Dunglaboro kaj kapitalo, p. 23

*

El tio do sekvas, ke en la mezuro en kiu akumuliĝas kapitalo, la situacio de la laboristo, kiom ajn estas lia pago, ĉu alta aŭ malalta, devas malpliboniĝi.

Das Kapital, MEW 23, 674-675

*

Ŝanĝoj, kiuj estas diktataj de socia nepreco, pli aŭ malpli frue tratabas al si la vojon; kiam ili fariĝis urĝa bezono, ili devas esti kontentigitaj, kaj la leĝdonado estas ĉiam devigata adaptiĝi al ili.

Nationalisierung des Bodens, MEW 18, 60

*

Lando estas des pli riĉa, ju malpli grandas ĝia produktiva loĝantaro proporcie al la tuta produkto; same kiel ĉe la individua kapitalisto, ju malpli laboristo bezonas por produkti la saman plusvaloron, des pli bone por li.

La lando estas des pli riĉa, ju malpli grandas la produktiva loĝantaro proporcie al la neproduktiva, ĉe la sama kvanto da produktoj. Ĉar la relativa malgrandeco de la produktiva loĝantaro estus ja nur alia esprimo por la relati-

va grado de la labor-produktivo.

Theorien über den Mehrwert, MEW 26.I, 199

*

La lasta iluzio de la kapitalisma sistemo, kvazaŭ la kapitalo estus la frukto de sia propra laboro kaj ŝparado, per tio frakasiĝas. Ne nur la profito konsistas en alproprigo de fremda laboro, sed la kapitalo, per kiu tiu fremda laboro estas movata kaj ekspluatata, konsistas el fremda proprieto, kiun la monkapitalisto disponigas al la industria kapitalisto kaj pro kio li siaflanke ekspluatas tiun.

Das Kapital, MEW 25, 524

*

Oni komprenas la ĝojon, se ene de la kreditsistemo ĉiuj ĉi eblaj kapitaloj, per sia koncentriteco en manoj de bankoj ktp fariĝas disponebla kapitalo, prunkapitalo, monkapitalo, kaj jam ne pasiva kaj kiel estontorevo, sed aktiva, pufiĝanta (en la senco de kresko).

Das Kapital, MEW 24, 489

*

La militdeklaro de Anglio aŭ pli ĝuste de la Orientindia Kompanio kontraŭ Persio estas la ripeto de tiuj ruzaĵoj kaj senrespektaj trukoj de la angla diplomatio en Azio, per kiuj Anglio ampleksigis siajn posedaĵojn sur tiu kontinento.

Ekde kiam la Kompanio ĵetas avidan rigardon al la posedaĵoj de iu ajn sendependa potenculo aŭ al regiono, kies politikaj kaj komercaj rimedoj aŭ kies oro kaj juveloj estas avidataj, oni kulpigas la viktimojn esti rompinta ian supozatan aŭ realan traktaton, ne plenuminta imagitan

Kapitalo kaj profito

promeson , transpaŝinta restriktan klaŭzon aŭ farinta ian ajn ne klarigeblan miskonduton, kaj tiam oni deklaras la militon.

Englisch-Persischer Krieg, MEW 12, 71

*

Estas bazo de la kapitalisma produktado, ke la mono kiel memstara formo de la valoro alfrontiĝas al la varo aŭ ke la ŝanĝvaloro devas akiri memstaran formon en la mono, kaj tio eblas nur per tio ke certa varo fariĝas la materialo in kies valoro mezuriĝas ĉiuj aliaj varoj, ke ĝi fariĝas ĝuste per tio la ĝenerala varo, la varo en la propra senco kontraste al ĉiuj aliaj varoj.

Tio devas montriĝi en duobla rilato, kaj nome ĉe la kapitalisme disvolvigitaj nacioj, kiuj anstataŭigas la monon en granda mezuro, unuflanke per kredit-operacioj, aliflanke per kreditmono.

En tempoj de malfacilo, kiam la kredito ŝrumpiĝas aŭ tute ĉesas, mono kiel sola pagrimedo kaj vera esto de la valoro subite alfrontas la varojn absolute. Pro tio la ĝenerala senvalorigo de la varoj, la malfacilo, eĉ la maleblo transformi ilin en monon [...].

Sed due: la kreditmono mem estas nur mono en la mezuro en kiu ĝi, en la alteco de sia nominala valoro, reprezentas absolute la realan monon [...].

Senvalorigo de la kreditmono [...] skuus ĉiujn ekzistantajn kondiĉojn.

Das Kapital, MEW 25, 532

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

*

La kontraŭdira moviĝo de la kapitalisma socio [...] plej klare senteblas en la ŝanĝiĝoj de la perioda ciklo kiun trairas la moderna industrio kaj kies kulmino estas – la ĝenerala krizo.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 28

*

La giganta, intermita etendeblo de la fabriksistemo kaj ĝia dependeco de la mondmerkato produktas nepre febran produktadon kaj postsekvan troplenigon de la merkatoj, kun kies kuntiriĝo okazas paralizo. La vivo de la industrio transformiĝas en sinsekvon de periodoj de meza vigleco, prospero, superproduktado, krizo kaj stagnado.

La kapitalo, ĉap. 10-13, p. 177, 178

*

Por ke krizo (do ankaŭ la superproduktado) estu ĝenerala, sufiĉas ke ĝi atingu la gvidajn komercaĵojn.

Theorien über den Mehrwert, MEW 26.2, 506

*

En la stato de malstreĉiĝo la produktado falas sub la ŝtupon, kiun ĝi atingis en la antaŭa ciklo kaj por kiu estas nun preparita la teĥnika bazo. En la prospero - la meza periodo - ĝi plu evoluas sur tiu bazo. En la periodo de superproduktado kaj de vertiĝo ĝi pleje streĉas la produktofortojn, ĝis trans la kapitalismajn limojn de la produktadprocezo.

Das Kapital, MEW 25, 506-507

Kapitalo kaj profito

*

La enspezoj de la neproduktivaj klasoj kaj de tiuj, kiuj vivas de fiksjaj enspezoj, plejgrandparte restas stataj dum la inflacio, kiu iras manenmane kun la superproduktado kaj superspekulado. Pro tio, ilia konsumkapablo malpliiĝas relative kaj pro tio [ankaŭ] ilia kapablo anstataŭigi la parton de la tuta reproduktado, kiu normale devus eniri ilian konsumadon. Eĉ se ilia postulo restus nominale sama, ĝi en realo malpliiĝas.

Das Kapital, MEW 25, 508

*

De jardekoj la historio de la industrio kaj de la komerco estas nur la historio de ribelado de la modernaj produktivaj fortoj kontraŭ la modernaj produktad-rilatoj, kontraŭ la proprieto-rilatoj, kiuj estas la ekzistokondiĉoj de la burĝaro kaj de ĝia regado. Sufiĉas mencii la komercokrizojn, kiuj, periode revenantaj, ĉiam pli minace dubindigas la ekziston de la tuta burĝa socio. Dum la komercokrizoj regule estas detruata ne nur granda parto de la produktitaj varoj, sed ankaŭ de la jam kreitaj produktivaj fortoj. Dum tiuj krizoj eksplodas socia epidemio, kiu al ĉiuj antaŭaj epokoj ŝajnintus absurdaĵo - la epidemio de la superproduktado.

La socio troviĝas subite repuŝita en staton de pormomenta barbareco; ŝajnas al ĝi, kvazaŭ malsatmizero, ĉion nenniiga milito estus fortranĉinta de ĝi ĉiujn nutraĵojn; ŝajnas neniigitaj la industrio, la komerco. Kaj kial? Ĉar ĝi posedas tro da civilizacio, tro da nutraĵoj, tro da industrio, tro da komerco. [...]

Per kio la burĝaro venkas la krizojn? Unuflanke per la degigita detruo de amaso da produktivaj fortoj; aliflanke per

la konkero de novaj merkatoj kaj la ĝisfunda ekspluatado de malnovaj merkatoj. Do, per kio? Per tio, ke ĝi preparas pli kompleksajn kaj pli gigantajn krizojn reproduktante la rimedojn por antaŭmalhelpi la krizojn.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 42s.

*

Kun konvena profito la kapitalo fariĝas aŭdaca. Dek elcento sekuraj, kaj eblas apliki ĝin ĉie; 20 elcento, ĝi vigliĝas; 50 elcento, pozitive aŭdaca; por 100 elcento ĝi stamfas ĉiajn homajn leĝojn sub sian piedon; 300 elcento, kaj ne ekzistas krimo kiun ĝi ne riskus, eĉ riske de pendumilo.

Das Kapital, MEW 23, 801

*

La vera limo de la kapitalisma produktado estas la kapitalo mem, nome: ke la kapitalo kaj ĝia memvalorigo aperas kiel elirpunkto kaj fina punkto, kiel motivo kaj celo de la produktado; ke la produktado estas nur produktado por la kapitalo kaj ne inverse la produktad-rimedoj estas nur rimedoj por konstante ampleksiĝanta formado de la vivprocezo de la socio de produktantoj. [...]

La rimedo - nepra disvolvado de la sociaj produktivfortoj - konstante konfliktiĝas kun la limigita celo, la valorigo de la ekzistanta kapitalo.

Se do la kapitalisma produktadmaniero estas historia rimedo por disvolvi la materian produktivforton kaj krei la mondmerkaton kiu respondas al ĝi, ĝi estas samtempe la konstanta kontraŭdiro inter tiu ĝia historia tasko kaj la sociaj produktivkondiĉoj kiuj respondas al ĝi.

Kapitalo kaj profito

Das Kapital, MEW 25, 260

*

La kapitalo, kiu havas tiel „bonajn kialojn” nei la suferojn de la ĝin ĉirkaŭanta laboristgeneracio, estas en sia praktika movado tiel malmulte kaj tiel multe determinata de estonta putriĝo de la homaro kaj nehaltigebla senpopoliĝo, kiel de la ebla falo de la Tero en la Sunon.

En ĉiu akciotrompaĵo ĉiu scias, ke la fulmotondro iam devas enbati, sed ĉiu esperas, ke ĝi trafos la kapon de lia najbaro, post kiam li mem kaptis la orpluvon kaj metis ĝin en sekuran lokon.

Post mi la diluvo! estas la devizo de ĉiu kapitalisto kaj de ĉiu kapitalisma nacio. Pro tio la kapitalo ne domaĝas sanon kaj vivlongon de la laboristo, kie la socio ne devigas ĝin al respekto.

Al la plendo pri korpa kaj spirita kripligo, antaŭtempa morto, torturo de trolaboro, ĝi respondas: Ĉu tiu turmento nin turmentu, ĉar ĝi pliigas nian plezuron (la profiton)?

Sed ĝenerale tio ankaŭ ne dependas de la bona aŭ malbona volo de la individua kapitalisto. La libera konkurenco funkciigas la imanentajn leĝojn de la kapitalisma produktado fronte al la individua kapitalisto kiel ekstera deviga leĝo.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 311, 312

*

Sur la kampo de politika ekonomio, la libera scienca esplorado renkontas ne nur la saman malamikon kiel sur ĉiuj aliaj kampoj. La aparta naturo de la temaro kiun ĝi

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

pritraktas alvokas kontraŭ ĝi la plej fortajn, plej etanimajn kaj plej malicajn pasiojn sur la bataalkampon. La angla alteklezio ekz-e pardonas pli facile la atakon al 38 de ĝiaj kredartikoloj ol al 1/39da ĝia monenspezo.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 17

*

Sed la valorleĝo estas en sia internacia aplikado eĉ pli modifata per tio ke en la mondmerkato la pli produktiva nacia laboro estas kalkulata ankaŭ kiel pli intensa, ĉiam kiam la pli produktiva nacio ne estas devigata de la konkurenco malaltigi la vendoprezon de sia varo al ties valoro.

Das Kapital, MEW 23, 584

*

La moderna burĝa socio kun siaj kondiĉoj de produktado, interŝanĝado kaj proprieto, do socio, kiu elsorĉis tiom gigantajn rimedojn de produktado kaj de interŝanĝado, similas al la magiisto, kiu ne plu kapablas regi la inferajn potencojn, kiujn li elvokis.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 42

*

La armiloj, per kiuj la burĝaro faligis la feŭdismon, nun direktiĝas kontraŭ la burĝaro mem.

Sed la burĝaro ne nur forĝis la armilojn, kiuj portos al ĝi la morton; ĝi ankaŭ generis la homojn, kiuj uzos tiujn armilojn - la modernajn laboristojn, la *proletojn*.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 42-43

Kapitalo kaj profito

*

Ekde tiu momento, en kiu laboro ne plu transformeblas en kapitalon, monon, terrenton, tio signifas, ne plu transformeblas en monopoligeblan socian potencon, do ekde tiu momento, kiam la persona proprieto ne plu povas transformiĝi en burĝan proprieton, ekde tiu momento vi deklaras, ke la individuo estas neniigita.

Vi do konfesas, ke sub individuo vi celas neniun alian personon ol la la burĝon, la burĝan proprieton. Kaj vere , tiun personon ni ja volas neniigi.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 55-56)

Historio kaj estonteco

La homoj faras sian propran historion, sed ili faras ĝin ne propravole, ne sub memelektitaj, sed sub rekte renkontitaj, donitaj kaj hereditaj cirkonstancoj.

Der 18. Brumaire des Louis Bonaparte, MEW 8, 115

*

La unua antaŭkondiĉo de ĉia homhistorio estas kompreneble la ekzisto de vivantaj homaj individuoj. La unua konstatenda fakto estas do la korpa organizo de tiuj individuoj kaj ilia per tio donita rilato al la cetera naturo.

[La perceptebla mondo kiu ĉirkaŭas la homon estas] ne ekde la eterno rekte donita ĉiam sama aĝo [...], sed la produkto de la industrio kaj de la socia stato, nome en tiu senco ke ĝi estas historia produkto, la rezulto de la agado de tuta vico da generacioj.

Die deutsche Ideologie etc., MEW 3

*

La mondhistorio fareblus tamen tre komforta, se la batalo estus komencata nur en senmanke favoraj kondiĉoj. Ĝi estus aliflanke de tre mistera naturo, se 'hazardoj' ne ludus rolon. Sed tiuj hazardoj eniras kompreneble mem en la ĝeneralan iradon de la evoluo kaj estas aliflanke kompensataj de aliaj hazardoj. Sed akcelo kaj malakcelo estas tre dependaj de tiaj 'hazardoj'.

Markso al Kugelmann

*

Oni ne bezonas aldoni ke la homoj ne libere elektas siajn produktivfortojn - la bazon de sia tuta historio; ĉar ĉiu produktivforto estas akirita forto, la produkto de antaŭa agado.

Historio kaj estonteco

La produktivfortoj estas do la rezulto de aplikita energio de la homoj, sed tiu energio mem estas limigita de la cirkonstancoj, en kiuj la homoj troviĝas, de la jam akiritaj produktivfortoj, de la sociformo, kiu ekzistas antaŭ ili, kiun ili ne kreas, kiu estas la produkto de la antaŭaj generacioj. Danke al la simpla fakto ke ĉiu nova generacio trovas la produktivfortojn akiritajn de la malnova generacio, kiuj servas al ĝi kiel krudmaterialo por nova produktado, estiĝas kunteksto en la historio de la homoj, [...] kiu estas des pli historio de la homaro, ju pli tiuj produktivfortoj de la homoj kaj sekve iliaj sociaj rilatoj kreskas.

Markso al Annenkov 1846-12

*

La neceso kontroli naturforton socie, mastrumi ĝin, unue alproprigi aŭ bridi ĝin per home faritaj produktoj en granda skalo, ludas la plej decidan rolon en la historio de la industrio. Tiel ekz-e la akvoregulado en Egiptio, Lombardio, Holando ktp. Aŭ en Hindio, Persio ktp, kie la akvumado per artefaritaj kanaloj alkondukas al la grundo ne nur la nemalhaveblan akvon, sed kun ties ŝlimo samtempe la mineralan sterkaĵon el la montaro. La sekreto de la industria florado de Hispanio kaj de Sicilio sub araba regado estis la kanalizado.

Das Kapital, MEW 23, 537

*

Kiel la sovaĝulo devas lukti kun la naturo por kontentigi siajn bezonojn, por konservi kaj reprodukti sian vivon, tiel devas tion la civilizito, kaj li devas tion en ĉiuj sociaj formacioj kaj sub ĉiuj eblaj produktadmanieroj.

Das Kapital, MEW 25, 828

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

*

En la sfero de terkulturo la granda industrio efikas plej revolucie en la senco ke ĝi neniigas la bastionon de la malnova socio, la „kampulon“, kaj substituas al tiu la dunglaboriston. La sociaj transformbezonoj kaj kontraŭdiroj de la kamparo estas tiel kompensataj per tiuj de la urbo. Sur la lokon de la plej kutim-pigra kaj plej malracia entreprenado venas konscia, teĥnologia aplikado de la scienco.

Das Kapital, MEW 23, 528

*

La parcelproprietaro ekskludas laŭ sia naturo: disvolvado de la sociaj produktadformoj de la laboro, sociajn formojn de laboro, socian koncentriĝon de la kapitaloj, grandskalan bredadon, progreseman aplikadon de la scienco.

Das Kapital, MEW 25, 815

*

[...] kiel efektive ĉiu aparta historia produktadmaniero havas siajn apartajn, historie validajn populacio-leĝojn. Abstrakta populacileĝo ekzistas nur por planto kaj besto.

Das Kapital, MEW 23, 660

*

El la manmuelilo rezultas socio kun feŭdaj sinjoroj, el la vapormuelilo rezultas socio kun industriaj kapitalistoj.

La mizero de la filozofio, p. 122

*

[La burĝa socio estas] la plej evoluinta kaj plej multfaceta

Historio kaj estonteco

historia organizo de la produktado [...] La kompreno de ĝia strukturo [ebligas do enrigardon] en la strukturon kaj la produktadkondiĉojn de ĉiuj pereintaj sociaj formoj, per kies ruinoj kaj elementoj ĝi konstruiĝis, el kiuj parte ankoraŭ nesuperitaj restoj daŭre kuntrenas sin, nuraj aludoj evoluis al elformitaj gravecoj.

Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42, 636

*

[La homoj estas] samtempe aŭtoroj kaj aktoroj de sia propra dramo.

La mizero de la filozofio, p. 128

*

Hegelo ie rimarkigas, ke ĉiuj grandaj mondhistoriaj faktoj kaj personoj okazas iel dufoje. Li forgesis aldoni: la unuan fojon kiel tragedio, la alian fojon kiel farso.

Der 18. Brumaire des Louis Bonaparte, MEW 8, 115

*

Nur sub la dua Bonaparte la ŝtato ŝajnas esti komplete memstariĝinta. La ŝtata maŝinaro firmiĝis kontraŭ la burĝa socio tiom, ke ĉe ĝia pinto sufiĉas la ĉefo de la Socio de la 10-a de Decembro, el fremdlando alkurinta aventuristo, surtronigita de ebria soldataro kiun li aĉetis per alkoholo kaj kolbasoj kaj kiun li ĉiam ree devas provizi per ili. Pro tio la humila malespero, la sento de la plej monstra humiliĝo, malestimigi, kiu premas la bruston de Francio kaj haltigas ĝian spiron. Ĝi sentas sin kvazaŭ senhonorigita.

Kaj tamen tiu ŝtatpotenco ne ŝvebas en la aero. Bonaparte reprezentas klason [...].

MEW 8, 197-198

*

Ekzistas granda fakto kiu estas tipa por nia 19-a jarcento, fakto kiun neniu partio kuraĝas nei. Ĉe unu flanko vekigis industriaj kaj sciencaj fortoj, kiujn nenia epoko de la antaŭa homa historio iam ajn imagis. Ĉe la alia flanko ekzistas simptomoj de dekadenco, kiuj larĝe eklipsas la teruraĵojn raportitajn pri la lasta tempo de la romia imperio.

[...] La venkoj de la scienco ŝajnas esti aĉetitaj per la perdo de karaktero. En la mezuro laŭ kiu la homaro konkuras la naturon, la homo ŝajnas esti subjugata de aliaj homoj aŭ de sia propra fieco. Eĉ la pura lumo de la scienco ŝajnas brili nur sur la malhela fono de la nescio.

Parolado dum la jarfesto de la „People's Paper“ la 14-an de aprilo 1956 en Londono, (Rede auf der jahresfeier des „People's Paper“ am 14. April 1856 in London), MEW 12, 3-4

*

La nobelaro mem estis esence burĝiĝinta. Anstataŭ umi pri fidelo, amo kaj kredo ĝi nun umis antaŭ ĉio pri betoj, alkoholo kaj lano. Ĝia ĉefa turnirejo fariĝis la lanmerkato.

Die Bourgeoisie und die Konterrevolution, MEW 6, 104

*

La revolucioj de 1648 kaj 1789 ne estis *anglakaj francarevolucioj*, ili estis *eŭropecaj* revolucioj. Ili ne estis la venko de *difinitaklaso* de la socio super la *malnova politika ordo*, ili estis la *proklamo de la politika ordo por la nova eŭropa socio*.

Die Bourgeoisie und die Konterrevolution, MEW 6, 107

Historio kaj estonteco

*

La tradicio de ĉiuj mortaj generacioj premas kvazaŭ premsonĝo sur la cerbo de la vivantoj. Kaj kiam ili ŝajnas ĝuste ege transformi sin kaj la aĵojn, krei ion ankoraŭ ne estintan, ĝuste en tiaj epokoj de revolucia krizo ili timeme alvokas la spiritojn de la pasinteco por ilia servo, pruntas de ili nomon, batalsloganon, kostumon, por prezenti en tiu tradicia kamuflado kaj per tiu pruntita lingvo la novan scenon de la mondhistorio.

Der 18. Brumaire des Louis Bonaparte, MEW 8, 115

*

Oni kontraŭargumentis, ke per la forigo de la privata proprietaĵo ĉesos ĉiu agado kaj disvastiĝos ĝenerala mallaboremo.

Laŭ tio, la burĝa socio jam delonge devus esti pereinta pro inerteco: ĝuste tiuj, kiuj laboras en ĝi, gajnas nenion, kaj tiuj, kiuj gajnas, ne laboras. La tuta argumento montriĝas taŭtologio: ne plu povas ekzisti dunga laboro se ne plu ekzistas kapitalo.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 56

*

Cetere, nenio estas pli ridinda ol la moralega ŝokiĝo de niaj burĝoj pri la laŭdire oficiala komuna posedo pri virinoj ĉe la komunistoj. La komunistoj ne devas enkonduki la komunan posedon pri virinoj, ĝi preskaŭ ĉiam ekzistis.

Niaj burĝoj, ne kontentaj ke al ilia dispono estas la virinoj kaj filinoj de iliaj proletoj - ne parolante pri la oficiala prostituado - trovas grandan plezuron en la reciproka delogado

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

de siaj edzinoj.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 58

*

Kiajn transformojn ricevos la ŝtatarato en komunisma socio? Alivorte, kiuj sociaj funkcioj restos tie, kiuj estas analogaj al la nunaj ŝtatk funkcioj? Tiu demando respondeblas nur science, kaj oni eĉ ne colon proksimiĝas al la problemo per milfoja kunmeto de la vorto popolo kun la vorto ŝtato.

Kritiko de la Gota Programo, p. 36

*

Socia formacio neniam pereas, antaŭ ol ĉiuj produktivfortoj estas evoluantaj, por kiuj ĝi estas sufiĉe larĝa, kaj novaj produktivkondiĉoj neniam anstataŭas ĝin, antaŭ ol ilia materiaj ekzistkondiĉoj estas elkovitaj en la sino de la malnova socio mem.

Zur Kritik der politischen Ökonomie, Vorwort, MEW 13,9

*

La burĝaj produktadkondiĉoj estas la lasta antagonisma formo de la socia produktadprocezo, antagonisma ne en la senco de individua antagonismo, sed de antagonismo elkreskanta el la sociaj vivkondiĉoj de la individuoj; sed la produktivfortoj evoluantaj en la burĝa socio kreas samtempe la materiajn kondiĉojn por solvi tiun antagonismon. Kun tiu socia formacio do finiĝas la antaŭhistorio de la homa socio.

Zur Kritik der politischen Ökonomie, Vorwort,, MEW 13, 9

Historio kaj estonteco

*

[La burĝaro] devigas ĉiujn naciojn alproprigi al si la produktadmanieron de la burĝaro, se ili ne volas perej; ĝi devigas ilin enkonduki la tiel nomatan civilizacion ĉe si mem, do fariĝi burĝoj. Mallonge: ĝi kreas al si mondon laŭ sia propra bildo.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4, 466)

*

Estas do la tasko de la historio, post kiam malaperis la transmondeco de la vero, starigi la veron de la ĉi-mondeco.

Zur Kritik der Hegelschan Rechtsphilosophie, Einleitung, MEW 1, 378

*

Milito kompreniĝas per si mem, ĉar ekonomie ĝi estas senpere tia, kvazaŭ nacio ĵetus parton de sia kapitalo en la akvon.

Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42, 47

*

La granda historia flanko de la kapitalo estas krei tiun pluslaboron, superfluan laboron el vidpunkto de la nura uzvaloro, de la nura vivteniĝo, kaj ĝia historia misio estas plenumita, ekde kiam la bezonoj estas tiom evoluintaj ke la plusa laboro ekster la necesa mem estas ĝenerala bezono.

Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42, 231

*

Ni komunistoj konas nur unu sciencon, la sciencon de la historio. La historio rigardeblas el du flankoj, ĝi divideblas

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

en la historion de la naturo kaj la historion de la homoj. Tamen la du flankoj ne estas disigeblaj; tiom longe kiom ekzistas homoj, la naturhistorio kaj la homhistorio kompletigas sin reciproke.

Die deutsche Ideologie etc., MEW 3, 18

*

La aserto, ke la libera konkurenco = la lasta formo de la evoluo de la produktivfortoj kaj pro tio de la homa libereco, signifas nenion alian ol ke la kapitalista potenco estas la fino de la mondhistorio – ja agrabla ideo por la suprenvenintoj de antaŭhieraŭ.

Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42, 545

*

La plej senhonta egoismo estis certe la sola movforto de Anglio, kiam ĝi lanĉis socian revolucion en Hindio; kaj la maniero en kiu ĝi trudis siajn interesojn estis stulta. Sed ne tio estas ĉie tie la demando. La demando estas, ĉu la homaro povas plenumi sian mision sen radikala revoluciigo de la sociaj kondiĉoj en Azio. Se ne, tiam Anglio estis, kiajn ajn krimojn ĝi faris, tamen la senkonscia instrumento de la historio, per tio ke ĝi survoĵigis tiun revolucion.

Die britische Herrschaft in Indien, MEW 9, 133

*

La historio de la tuta ĝisnuna socio estas la historio de klasbataloj.

Liberulo kaj sklavo, patricio kaj plebano, barono kaj servutulo, gildano kaj submajstro, unuvorte, subpremantoj kaj subprematoj, staris unu kontraŭ la alia en daŭra opozicio,

Historio kaj estonteco

havis seninterrompan batalon, foje kaŝe – foje malkaŝe, batalon, kiu ĉiufoje finiĝis per revolucia transformo de la tuta socio aŭ per komuna pereco de la batalintaj klasoj.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 35-36

*

En tempoj, fine, kiam la klasbatalo proksimiĝas al la decido, la procezo de disfalo ene de la dominanta klaso, ene de la tuta malnova socio, fariĝas tiom impeta, tiom akra, ke malgranda parto de la dominanta klaso forlasas ĝin kaj aliĝas al la revolucia klaso, al la klaso kiu portas la estontecon en siaj manoj.

Do, kiel antaŭe parto de la nobelaro transiris al la burĝaro, tiel nun parto de la burĝaro transiras al la proletaro, kaj nome parto de tiuj burĝaj ideologoj kiuj per sia studado alvenis al kompreno de la tuta historia movado.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 48

*

Revolucioj estas la lokomotivoj de la historio.

Die Klassenkämpfe in Frankreich, MEW 4, 493

*

Same tiom, kiom estas forigita la ekspluatado de unu individuo per alia, same tiom finiĝos la ekspluatado de unu nacio per alia.

Lige al la malapero de klasaj antagonismoj interne de la nacio malaperos la malamikeco inter la nacioj.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 59

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

*

Sed nia epoko, la epoko de la burĝaro, distingiĝas per tio ke ĝi simpligis ĉiujn klasajn kontraŭdirojn. La tuta socio fendiĝas pli kaj pli en du grandajn malamikajn tendarojn, en du grandajn, rekte alfrontiĝantajn klasojn: burĝaro kaj proletaro.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4)

*

Necesas [...] nur la komuniĝo por centri la multajn lokajn batalojn de ĉie sama karaktero al unu nacia, al klasbatalo.

Sed ĉia klasbatalo estas politika batalo.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4)

*

La mezaj statoj, la eta industriisto, la eta komercisto, la metiisto, la terkulturisto, ili ĉiuj kontraŭbatalas la burĝaron, por sekurigi sian ekzistadon kiel mezaj statoj kontraŭ pereco. Ili do ne estas revoluciaj, sed konservativaj. Eĉ pli, ili estas reaciaj, ili provas retroturni la radon de la historio.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4)

*

Vi terurigas, ke ni volas forigi la privatan proprietajn. Sed en via ekzistanta socio la privata proprietajo estas forigita por naŭ dekonoj de la membroj, ĝi ĝuste tial ekzistas, ĉar por naŭ dekonoj ĝi ne ekzistas. Vi do riproĉas al ni, ke ni volas forigi proprietajn por kies ekzisto la necesa kondiĉo estas la neekzisto de iu ajn proprietajo por la

Historio kaj estonteco

grandega majoritato de la socio.

Unuvorte, vi riproĉas al ni, ke ni volas forigi vian proprietaĵon. Ĝuste tiel, tion ni volas.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 55

*

La komunisma revolucio estas la plej radikala rompo kun la hereditaj proprietrilatoj; estas nature ke en sia evoluo ĝi rompas plej radikale kun la hereditaj ideoj.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4)

*

Sur la loko de la malnova burĝa socio kun ĝiaj klasoj kaj klasaj kontraŭdiroj aperas asocio, en kiu la libera disvolviĝo de ĉiu estas la libera disvolviĝo de ĉiuj.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4)

*

Libera komerco! en la intereso de la laboranta klaso; protekto-doganaĵoj! en la intereso de la laboranta klaso; ĉel-prizonoj! en la intereso de la laboranta klaso; jen la lasta, la sole serioze eldirita vorto de la burĝa socialismo.

La socialismo de la burĝaro konsistas simple en la aserto, ke la burĝoj estas burĝoj – en la intereso de la laboranta klaso.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4)

*

Ĉiu paŝo de vera movado estas pli grava ol deko da pro-

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

gramoj.

Markso al Bracke, MEW 19, 12

*

Ĉiu devas povi kontentigi sian religian kiel sian korpan neceson, sen ke la polico enŝovu sian nazon.

Kritiko de la Gotaa Programo, p. 39

Revolucio kaj politiko

La armilo de kritiko tamen ne povas anstataŭi la kritikon de la armiloj, la materia potenco estas faligenda per materia potenco, sed ankaŭ la teorio fariĝas materia potenco, ekde kiam ĝi kaptas la amasojn.

Zur Kritik der hegelschen Rechtsphilosophie, MEW 1

*

La perforta disbato de revolucio postlasas en la kapoj de ĝiaj roluloj, nome de la ekzilitaj, ŝokon kiu igas eĉ bravajn personecojn por pli aŭ malpli longa tempo iel malkompetentaj. Ili ne povas akcepti la evoluon de la historio, ili ne volas kompreni ke la formo de la movado ŝanĝiĝis. Pro tio okazas konspiraj kaj revoluciaj ludadoj, same kompromitaj por ili mem kiel por la kaŭzo kiun ili servas.

[...] Post la pereco de la revolucio de 1848 la germana laborista movado ekzistis jam nur en la formo de teoria, krome en etaj rondoj limigita propagando, pri kies praktika sendanĝereco la prusa registaro neniam trompiĝis. Por ĝi la kontraŭkomunista agitado havis nur la sencon enkonduki la krucmiliton de la reakciuloj kontraŭ la liberala burĝaro.

*Enthüllungen über den Kommunisten-Prozeß in Köln,
MEW 18, 567-568; 569*

*

En la mezepoko ekzistis en Germanio sekreta juĝejo, nomata *Feme*-juĝejo. Ĝi ekzistis por venĝi la fifarojn de la reganta klaso. Se oni trovis domon signitan per ruĝa kruco, tiam oni sciis ke la posedanto estis kondamnita de la *Feme*.

Ĉiuj domoj de Eŭropo estas nun signitaj per la mistera ruĝa kruco. La historio estas la juĝisto - ĝia ekzekutisto la proleto.

Parolado dum la jarfesto de la „People's Paper“ la 14-an de aprilo en Londono (Rede auf der Jahresfeier der „People's Paper“ am 14. April 1856 in London), MEW 12, 4

*

El ĉiuj klasoj, kiuj nuntempe kontraŭstaras la burĝaron, nur la proletaro estas vere revolucia klaso. La ceteraj klasoj disfalas kaj pereas kun la granda industrio, la proletaro estas ties plej propra produkto.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4, 472)

*

La limo de la politika emancipiĝo aperas tuj en tio ke la ŝtato povas liberigi sin el sia baro sen ke la homo estus *reale* libera de tiu, ke la ŝtato povas esti *libera ŝtato*, sen ke la homo estus *libera* homo.

[...] La ŝtato estas la peranto inter la homo kaj la libereco de la homo. Same kiel Kristo estas la peranto, kiun la homo ŝarĝas per sia tuta dieco, sia tuta religia ligiteco, tiel la ŝtato estas la peranto, en kiun li delokas sian tutan homan neligitecon.

[...] La ŝtato nuligas siamanier la diferencojn de naskiĝo, de stato, de klereco, de okupateco, kiam ĝi deklaras naskiĝon, staton, klerecon, okupatecon kiel nepolitikajn diferencojn, kiam ĝi senrigarde al tiuj diferencoj deklaras ĉiun membron de la popolo samranga partoprenanto de la popola suvereneco, kiam ĝi traktas ĉiujn elementojn de la reala popola vivo el la ŝtata vidpunkto.

Revolucio kaj politiko

Zur Judenfrage, MEW 1, 353; 354

*

Sur certa ŝtupo de sia evoluo la materiaj produktivfortoj de la socio ektroviĝas en kontraŭdiro kun la ekzistantaj produktadrilatoj aŭ, kio estas nur jura esprimo de tio, kun la proprietkrilatoj, ene de kiuj ili ĝis tiam moviĝis. El disvolvoformoj de la produktivfortoj tiuj rialtoj transformiĝas en ties ligilojn. Tiam komencas epoko de socia revolucio.

Zur Kritik der politischen Ökonomie, Vorwort, MEW 13, 9

*

Pro tio la homaro donas al si nur taskojn kiujn ĝi povas plenumi, ĉar ĉe pli detala rigardo oni ĉiam trovas ke la tasko mem nur estiĝas tie, kie la materiaj kondiĉoj por ĝia plenumo jam ekzistas aŭ estas almenaŭ estiĝantaj.

Zur Kritik der politischen Ökonomie, Vorwort, MEW 13,9

*

La principo de la politiko estas la volo. Ju pli unuflanka, do ju pli perfekta estas la politika kompreno, des pli ĝi kredas je la ĉiopoveco de la volo, des pli blinda ĝi estas pri la naturaj kaj spiritaj baroj de la volo, do des pli nekapabla ĝi estas malkovri la fonton de sociaj problemoj.

Kritische Randglossen zu dem Artikel „Der König von Preußen und die Sozialreform. Von einem Preußen“ („Vorwärts!“ Nr. 60), MEW 1, 402

*

Ŝajnigi ion al la aliaj kaj ĉe tio ŝajnigi ion al si mem – tio estas la parlamenta saĝo en sia kerno.

Letero al Danielson, MEW 35, 157

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

*

La elektofilozofio de la parlamentaj kandidatoj konsistas simple en tio, ke ili permesas al sia maldekstra mano ne scii kion faras ilia dekstra, kaj tiel ili lavas ambaŭ manojn en senkulpeco.

Wahlkorruption in England, MEW 13, 525

*

La tuta saĝo de niaj ŝtatuoj fine signifas granda transigo de proprieto de unu klaso de personoj al alia.

Theorien über den Mehrwert, MEW 26.3, 303

*

[Kiu serĉas inter du burĝaj registaroj la malpli grandan malbonon, troviĝas] en la situacio de la azeno de Buridano, ne inter du sakoj da fojno, por decidi kiu estas pli loga, sed ja inter du bastonbatoj, por decidi kiu estas pli dolora.

Der 18. Brumaire des Louis Bonaparte, MEW 8, 190

*

En progresinta socio kaj per la trudo de la situacio la etburĝo fariĝas unuflanke socialisto, aliflanke ekonomisto, do li estas blindigita de la majesto de la granda burĝaro kaj havas kompaton kun la suferoj de la popolo. Li estas burĝo kaj popolo samtempe. En la plej interna parto de sia konscienco li flatas sin esti senpartia, esti trovinta la ĝustan ekvilibron [...].

Tia etburĝo diigas la kontraŭdiron, ĉar la kontraŭdiro

Revolucio kaj politiko

estas la kerno de lia esto. Li mem estas nur la socia kontraŭdiro en ago.

Karlo Markso al Annenkov, MEW 4, 557

*

Por la etburĝo, kiu vidas en la varproduktado la kulminon de homa libereco kaj de individua sendependeco, estus kompreneble tre dezirinde se li estus senigita je la misoj ligitaj kun tiu formo.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 85, n. 1

*

La burĝaro ne movis manon. Ĝi permesis al la popolo batali por ĝi. La potenco transdonita al ĝi estis pro tio ne la potenco de militestro kiu venkis sian malamikon, sed la potenco de sekureckomitato, al kiu la venka popolo konfidis la zorgadon pri ĝia propraj interesoj.

Die Bourgeoisie und die Konterrevolution, MEW 6, 106

*

Ĉiuk klasoj kaj partioj unuiĝis [...] al la *Partio de la Ordo* kontraŭ la proleta klaso kiel la *Partio de la Anarĥio*, de la socialismo, de la komunismo. Ili „savis” la socion kontraŭ „*la malamikoj de la socio*”. Ili disdonis la sloganojn de la malnova socio, „proprietio, familio, religio, ordo” kiel rekonparolon inter sia armeo kaj kriis al la kontraŭrevolucia krucmilitistaro: „Sub tiu signo vi venkos!”

Der 18. Brumaire des Louis Bonaparte, MEW 8, 123

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

*

Ĉia postulo de la plej simpla burĝa financreformo, de la plej ordinara liberalismo, de la plej formala respublikaneco, de la plej plata demokratio, estas samtempe punata kiel „atenco al la socio” kaj brulmarkita kiel „socialismo”.

Der 18. Brumaire des Louis Bonaparte, MEW 8, 123

*

La moralo estas la senpoveco en ago. Ĉiufoje kiam ĝi kontraŭbatalas malvirton, ĝi malvenkas.

Die heilige Familie, MEW 2, 213

*

Anstataŭ decida politika opozicio - ĝenerala perado; anstataŭ batalo kontraŭ registaro kaj burĝaro - la provo gajni kaj persvadi ĝin; anstataŭ obstina rezistado kontraŭ desupraĵ ekscesoĵ - humila submetiĝo kaj la koncedo ke oni meritas la punon.

Zirkularbrief an die SPD-Führung 1879, MEW 19, 162-165

*

Sed la demokrato, ĉar li reprezentas la etburĝaron, do transiran klason, en kiu la interesoj de du klasoj sin reciproke malakrigas, kredas sin entute super la klasa kontraŭdiro.

Der 18. Brumaire des Louis Bonaparte, MEW 8, 144

*

[La utopiaj socialistoj] rifuzas [...] ĉian politikan, nome

Revolucio kaj politiko

ĉian revolucionan agon, ili volas atingi kaj provi sian celon sur la paca vojo, per etaj, kompreneble fiaskantaj eksperimentoj, per la povo de la ekzemplo tratabi la vojon al la nova socia evangelio.

Ili ja konscias reprezenti en siaj planoj precipe la intereson de la laboranta klaso kiel la plej suferanta klaso. Nur sub tiu aspekto de suferanta klaso la proletaro ekzistas por ili.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4)

*

La impostoj estas la ekonomia bazo de la registara maŝino kaj nenio alia.

Kritiko de la Gotaa Programo, p. 38

*

Tiom, kiom la ĝis nun dominantaj partioj dissolviĝas kaj malklariĝas iliaj individuaj trajtoj, kompreneble sentebblas la manko de nova opozicia partio.

Über Versuche, eine neue Oppositionspartei zu gründen, MEW 8, 387

*

Tiu organiziĝo de la proletoj al klaso, kaj per tio al politika partio, estas ĉiumomente eksplodigita de la konkurenco inter la laboristoj mem. Sed ĝi restariĝas ĉiam denove, pli forta, pli firma, pli potenca. Ĝi trudas la agnoskon de unuopaj interesoj de la laboristoj en leĝa formo, uzante la fendiĝojn ene de la burĝaro.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4, 471)

*

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

Ĉia movo, per kiu la laborista klaso kiel klaso alfrontas la dominantajn klasojn kaj provas devigi ilin, per desuba premo, [estas] politika movo. Ekz-e la provo en individua fabriko aŭ en individua branĉo per strikoj ktp trudi al la individuaj kapitalistoj limigon de la labortempo, estas pure ekonomia movo; kontraŭe la movo trudi okhoran [labor]tagon per leĝo, estas politika movo.

K. Markso al F. Bolte, 1871-11-23, MEW 33, 332-333

*

La esenco ne konsistas en tio ke, per tio ke ĉiu sekvas sian privatan intereson, atingiĝas la tutaĵo de la privataj interesoj, do la ĝenerala intereso. El tiu abstrakta frazo oni povus same bone konkludi, ke ĉiu reciproke malhelpas la realigon de la intereso de la aliaj, kaj ke anstataŭ ĝenerala pozitiva efiko rezultas ĝenerala neniigo el tiu milito de ĉiuj kontraŭ ĉiuj. La esenco kuŝas pli ĝuste en tio, ke la privata intereso mem estas jam socie determinita intereso kaj atingebblas nur ene de la kondiĉoj starigitaj de la socio kaj nur per la rimedoj donitaj de ĝi; ke ĝi estas do ligitaj al reproduktado de tiuj kondiĉoj kaj rimedoj.

[Grundrisse der Kritik der politischen Ökonomie, MEW 42]

*

Tiom longe, kiom la dungolaboristo estas dungolaboristo, lia sorto dependas de la kapitalo. Tio estas la multe laŭdata komuneco de la interesoj de laboristo kaj kapitalisto.

Dunglaboro kaj kapitalo, p. 23

*

Ĉiu nova klaso [...], kiu metas sin en la lokon de antaŭe

Revolucio kaj politiko

reganta, estas devigata, jam por plenumi sian celon, prezenti sian intereson kiel la komunan intereson de ĉiuj membroj de la socio, t. e. ideo esprimite: doni al siaj pensoj la formon de ĝeneraleco, prezenti ilin kiel la sole raciajn, ĝenerale validajn.

La revolucia klaso sursceniĝas dekomence, jam ĉar ĝi alfrontas klason, ne kiel klaso, sed kiel reprezentanto de la tuta socio fronte al la sola, reganta klaso. Ĝi povas tion fari, ĉar komence ĝia intereso vere ankoraŭ pli kunteniĝas kun la komuna intereso de ĉiuj ceteraj neregantaj klasoj.

Die deutsche Ideologie etc., MEW 3, 47

*

La revolucia programo ne estas forlasota, sed nur prokrastota – ĝis nedefinita tempo. Oni akceptas ĝin, sed envere ne por si mem kaj por sia vivotempo, sed post sia morto, kiel heredaĵo por infanoj kaj nepoj. Intertempe oni dediĉas sian „tutan forton kaj energion” al diversaj etaĵoj kaj flikadoj ĉe la kapitalisma sociordo, por ke tio tamen aspektu kvazaŭ io okazus kaj samtempe la burĝaro ne ektimu.

Zirkularbrief an die SPD-Führung, MEW 19, 162

*

La faligo de la kapitalisma ordo [estas] en neatingebla foro, do havas nenian signifon por la politika praktiko de la nuntempo; oni povas peri, kompromisi, homrajtadi laŭplaĉe.

Same okazas kun la klasbatalo inter proletaro kaj burĝaro. Sur la papero oni agnoskas ĝin, ĉar oni jam ne povas fornei ĝin, sed en la praktiko oni forkaŝas, diluas, malfortigas ĝin. La socialdemokrata partio ne estu laborista partio,

ĝi ne altiru la malamon de la burĝaro aŭ entute de iu sur sin. [...]

Anstataŭ emfazi antaŭirajn celojn, kiuj timigas la burĝaron kaj tamen en nia generacio ne atingeblas, ĝi prefere dediĉu sian tutan forton kaj energion al tiuj etburĝaj flik-reformoj, kiuj donas al la malnova sociordo novajn apogilojn kaj per tio povus la finan katastrofon eble transformi en iom-post-ioman, popecan kaj kiom eble plej pacan dissolvo-procezon.

Ĉe la fondo de la Internacio ni eksplicite formulis la batal-devizon: La liberigo de la laborista klaso devas esti la faro de la laborista klaso mem. Ni do ne povas kuniri en la sama partio kun homoj, kiuj malkaŝe eldiras ke la laboristoj estas tro malkleraj por liberigi sin mem kaj devas esti liberigitaj nur desupre.

Zirkularbrief an die SPD-Führung, MEW 19, 162

*

Revolucioj ne estas farataj de partio, sed de la tuta popolo.

MEW 34, 514

*

La perforto estas la akuŝisto de ĉia malnova socio kiu gravas je nova.

Das Kapital, MEW 23, 779

*

Revolucio kaj politiko

Dum ĝenerala ekonomia florado, en kiu la produktivfortoj de la burĝa socio tiom abunde disvolviĝas kiom entute eblas ene de la burĝaj kondiĉoj, ne povas okazi vera revolucio.

Tia revolucio eblas nur en tiuj periodoj, dum kiuj tiuj du faktoroj, la modernaj produktivfortoj kaj la burĝaj produktadformoj, eniras en kontraŭiron unu kun la alia. Nova revolucio eblas nur en la sekvo de nova krizo. Sed ĝi estas ankaŭ same certa kiel tiu.

Klassenkämpfe in Frankreich, MEW 7, 98

*

La homoj neniam rezignas pri tio kion ili gajnis, sed tio ne signifas ke ili neniam rezignas pri la sociformo en kiu ili akiris certajn produktivfortojn. Tute male.

Por ne perdi la celatan rezulton, por ne perdi la fruktojn de la civilizacio, la homoj estas devigataj, ekde kiam la maniero de ilia ekonomia agado jam ne kongruas kun la akiritaj produktivformoj, ŝanĝi ĉiujn hereditajn sociajn formojn.

K. Markso al Annenkov, MEW 4, 549

*

Eĉ la decidaj membroj de la maldekstro, anstataŭ rekte alfronti la tutan asembleon, ne rezignas pri la espero ankoraŭ akiri ion en la Ĉambro kaj per la Ĉambro kaj atingi plimulton por la maldekstro. Anstataŭ adopti eksterparlamentan sintenon en la parlamento, la sola honorinda en tia Ĉambro, ili, favore al la parlamenta ebleco, faras unu koncedon post la alia, anstataŭ kiom eble ignori la konstitucian vidpunkton, ili serĉas laŭorde la okazon por, pro la kara paco, koketi kun ĝi.

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

Neue Rhein-Zeitung, MEW 6, 373

*

La demokrataj etburĝoj, anstataŭ voli profunde transformi la tutan socion por la revoluciaj proletoj, alstrebas ŝanĝon de la sociaj kondiĉoj, per kiuj la ekzistanta socio fariĝu al ili kiom eble plej eltenebla kaj komforta.

Ili do postulas antaŭ ĉio la malpliigon de la ŝtatspezoj per limigo de la burokrataro kaj transigo de la ĉefa imposto al la grandaj terproprietuloj kaj burĝoj. Ili postulas krome la forigon de la premo de la granda kapitalo sur la malgrandan per publikaj kreditinstitucioj kaj leĝoj kontraŭ uzuro.

Rundschreiben an den Bund der Kommunisten, MEW 7, 247

*

Estas la reprezentantoj de la etburĝaro kiuj elpaŝas, plenaj de timo ke la proletaro, urĝata de sia revolucia situacio, povu „iri tro antaŭen”.

[...] Ĉiuj historie necesaj konfliktoj estas alie interpretataj kiel miskomprenoj kaj ĉiuj diskutoj ĉesigataj per la aserto: en la esenco ni ja ĉiuj interkonsentas [...]; la faligo de la kapitalisma ordo [kuŝas] en neatingebla foro, havas do absolute nenian gravecon por la politika praktiko de la nuntempo.

[...] Kie la klasbatalo estas flanken ŝovata kiel neŝatata aŭ „kruda” fenomeno, tie restas kiel bazo de socialismo nenio ol „vera homamo” kaj senenhavaj frazoj pri „justeco”.

Rundschreiben an die SPD-Führung, „Zirkularbrief an Bebel, Liebknecht, Bracke u.a.”, MEW 19, 163

*

Revolucio kaj politiko

En sia batalo kontraŭ la kolektiva potenco de la posedantaj klasoj la proletaro povas agi kiel klaso nur se ĝi konsistigas sin mem kiel aparta politika partio kontraste al la malnovaj partioj estiĝintaj de la posedantaj klasoj. – Tiu konsistiĝo de la proletaro kiel politika partio estas nepre por certigi la triumfon de la socia revolucio kaj de ĝia plej alta celo, la nuligo de la klasoj.

Resolution des Haager Kongresses der IAA, MEW 18, 149

*

La komunistoj distingiĝas de la aliaj nur per tio:

1. En la diversaj naciaj bataloj de la proletoj ili elstarigas kaj respektigas la komunajn interesojn de la tuta proletaro, sendependajn de la nacieco.

2. En la diversaj evoluŝtupoj, kiujn trapasas la batalo inter proletaro kaj burĝaro, ili ĉiam reprezentas la interesojn de la tuta movado.

Do, la komunistoj praktike estas la plej energia, ĉiam antaŭenpuŝa parto de la laboristaj partioj de ĉiuj landoj; ilia avantaĝo rilate la alian amason de la proletaro estas, ke ili disponas ekkonojn pri la kondiĉoj, la marŝlinio kaj la ĝeneralaj rezultoj de la proleta movado.

Manifesto de la Komunsita Partio, p. 52

*

Per unu vorto, la komunistoj subtenas ĉie ĉian revolucion movadon kontraŭ la ekzistantaj sociaj kaj politikaj kondiĉoj. En ĉiuj ĉi movadoj ili emfazas la demandon de proprieto, egale kiom ajn pli aŭ malpli evoluintan formon tiu estas alpreninta, kiel la bazan demandon de la movado.

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4, 492)

*

Kiam la maldekstro volis venki en la parlamento, ĝi ne rajtis preni la armilojn. Kiam en la parlamento ĝi alvokis al la armiloj, ĝi ne rajtis sur la strato kondukti parlamente.

Der 18. Brumaire des Louis Bonaparte, MEW 8, 144

*

Ni devas deklari al la registaroj: Ni scias ke vi estas la armita potenco direktita kontraŭ la proletoj; ni agos kontraŭ vi per la paca vojo, tie kie tio eblos al ni, kaj per armiloj, kiam tio fariĝus necesa.

Sitzungsprotokoll der IAA, MEW 17, 652

*

Homo kiu ne komprenis la nunan sociordon, [estas] eĉ malpli kapabla [...] kompreni la movadon kiun li volas transformi, kaj la literaturan esprimiĝon de tiu revolucia movado.

Markso al Annenkov, MEW 27, 461

Socialismo kaj komunismo

En pli alta fazo de la komunisma socio, post kiam malaperis la servutiga submeto de la individuoj sub la dividon de la laboro, per tio ankaŭ la kontraŭdiro de spirita kaj korpa laboro; post kiam la laboro fariĝis ne nur vivrimedo, sed mem la unua vivbezono; post kiam kreskis kun la ĉiuflanka evoluo de la individuoj ankaŭ iliaj produktadfortoj kaj fluas ĉiuj fontoj de la asocia riĉaĵo - nur tiam komplete transpaŝeblas la mallarĝa burĝa jurhorizonto kaj la socio povas skribi sur sian flagon: Ĉiu laŭ siaj kapabloj, al ĉiu laŭ liaj bezonoj!

Kritiko de la Gotaa Programo, p. 25-26

*

La komunismo estas por ni ne starigenda *stato*, sed *idealo*, laŭ kiu la realo devos orientiĝi. Ni nomas komunismo la realan movadon, kiu nuligas la nunan staton. La kondiĉoj de tiu movado rezultas el la nun ekzistanta antaŭkondiĉo.

Die deutsche Ideologie etc., MEW 3, 35

*

Kio distingas la komunismon, tio ne estas la forigo de la proprieto entute, sed la forigo de la burĝa proprieto.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4, 475)

*

Inter la kapitalisma kaj la komunisma socio estas la periodo de la revolucia transformado de la unua al la alia. Al tio respondas ankaŭ politika transir-periodo, kies ŝtato povas esti nenio alia ol la *revolucia diktatoreco de la proletaro*.

Kritiko de la Gotaa Programo, p. 36

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

*

La komunismo distingiĝas de ĉiuj ĝisnunaj movadoj per tio ke ĝi profunde transformas la bazon de ĉiaj ĝisnunaj produktad- kaj cirkulad-kondiĉoj kaj traktas por la unua fojo ĉiujn nature estiĝintajn kondiĉojn konscie kiel kreitaĵojn de la ĝisnunaj homoj, malvestas ilian naturdevenecon kaj submetas ilin al la povo de la kuniĝintaj individuoj.

Die deutsche Ideologie etc., MEW 3, 70

*

Nur kiam granda socia revolucio majstris la rezultojn de la burĝa epoko, la mondmerkaton kaj la modernajn produktadfortojn kaj submetis ilin al la komuna kontrolado de la plej progresintaj popoloj, nur tiam la homa progreso jam ne similos al tiu aĉa pagana diaĵo kiu volis trinki la nektaron el la kranioj de mortbatitoj.

Die britische Herrschaft in Indien, MEW 9, 226

*

La egaligo de la klasoj, laŭvorte interpretite, lastinstance signifas la harmonion de kapitalo kaj laboro, kiun la burĝaj socialistoj tiel insiste predikas. Ne la egaligo de la klasoj – logika absurdaĵo, malebla realigi –, sed pli ĝuste la forigo de la klasoj, tiu vera sekreto de la proleta movado, formas la grandan celon de la Internacia Laborista Asocio.

Markso nome de la ILA al la bakunistoj, MEW 16, 149

Socialismo kaj komunismo

*

Iu laboristo estas edziĝinta, la alia ne; iu havas pli da infanoj ol la alia, ktp ktp. Ĉe sama laborprodukto, kaj do ĉe sama proporcio de la socia konsumfonduso, iu ricevas do fakte pli ol la alia, iu estas pli riĉa ol la alia ktp. Por eviti ĉiujn ĉi misojn, la juro devus, anstataŭ esti egala, prefere malegala. Sed tiaj misoj estas neeviteblaj en la unua fazo de la komunisma socio, tia kia ĝi ĵus eliris el la kapitalisma socio post longaj naskodoloroj. La juro povas esti neniam pli alta ol la ekonomia formiĝo kaj la kultura evoluo kondiĉita de tiu.

Kritiko de la Gota Programo, p. 25

*

Kvankam ne laŭ la enhavo, sed ja laŭ la formo, la batalo de la proletaro kontraŭ la burĝaro estas unue nacia. La proletaro de ĉiu lando devas kompreneble unue venki sian propran burĝaron.

Manifesto de la Komunista Partio, (MEW 4, 473)

*

La komunist-proceso de Kolonjo mem brulstampas la senpovecon de la ŝtatpotenco en sia batalo kontraŭ la socia evoluo. La reĝa prusa prokuroro tialas la kulpon de la akuzitoj fine per tio, ke ili kaŝe disvastigis la principojn de la „Komunista Manifesto“, danĝerajn por la ŝtato. Kaj ĉu tiuj samaj principoj dudek jarojn poste ne estas en Germanio malkaŝe deklarataj sur la strato? Ĉu ili ne sonas eĉ el la tribuno de la parlamento? Ĉu ili, en la formo de la Programo de la Internacia Laborista Asocio ne faris la vojaĝon ĉirkaŭ la mondo, spite al ĉiaj registaraj serĉleteroj? Estas

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

tiel, ke la socio ne trovas sian ekvilibron ĝis kiam ĝi rondiras ĉirkaŭ la Suno de la laboro.

Manifesto de la Komunista Partio, MEW 8, 576

*

Temas ĉi tie pri komunisma socio, ne kia ĝi *evoluis* sur siaj propraj bazoj, sed inverse, kia ĝi ĵus eliris el la kapitalisma socio, do ĉiurilate, ekonomie, morale, spirite, ankoraŭ makulita per la patrinmakuloj de la malnova socio, el kies utero ĝi devenas.

Kritiko de la Gotaa Programo, p. 23

*

La religia rebrilo de la reala mondo povas entute nur malaperi, ekde kiam la kondiĉoj de la praktika labortaga vivo prezentas al la homoj ĉiutage travideble raciajn rilatojn inter ili kaj kun la naturo. La formo de la socia vivprocezo, do de la materia produktadprocezo, nur tiam demetas sian mistikan nebulvualon, ekde kiam ĝi, kiel produkto de libere sociiĝintaj homoj, staras sub ties planita kontrolo. Sed por tio necesas materia bazo de la socio aŭ vico da materiaj ekzistadkondiĉoj, kiuj siavice estas mem produkto de longa kaj turmenta evoluhistorio.

La kapitalo, ĉap. 1-9, p. 96-97

*

La komunismo prenas al neniuj povon alproprigi al si sociajn produktojn, ĝi prenas nur la povon per tiu alproprigo subjugi al si fremdan laboron.

Manifesto de la Komunista Partio, MEW 4, 477

Socialismo kaj komunismo

*

La komunistoj ne inventas la efikon de la socio sur la edukado; ili nur ŝanĝas ĝian karakteron, ili forprenas la edukadon el la influo de la reganta klaso.

Manifesto de la Komunista Partio, MEW 4, 478

*

Sed vi komunistoj volas enkonduki la komunan posedon pri virinoj, krias al ni ĥore la burĝaro.

La burĝo vidas en sia edzino nuran produktado-instrumenton. Li aŭdas, ke la produktado-instrumentoj estu komune ekspluatataj, kaj kompreneble li nur povas veni al la konkludo, ke la sorto de la komuna sociigo same trafos la virinojn.

Li ne suspektas, ke ĝuste necesas forigi la pozicion de la virinoj kiel nuraj produktado-instrumentoj.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 58

*

[La „vera socialismo“] servis al la germanaj absolutaj registaroj kun ilia sekvantaro de pastroj, instruistoj, junkroj kaj burokratoj kiel bonvena birdotimigilo kontraŭ la minace leviĝanta burĝaro.

Ĝi fariĝis la dolĉeta deserto por la amaraj vipadoj kaj kugloj, per kiuj la samaj registaroj pritraktis la germanajn laboristajn ribelojn.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 69

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

*

Al la komunistoj oni krome riproĉis, ke ili volas forigi la patrujon, la naciecon.

La laboristoj ne havas patrujon. Oni ne povas de ili preni, kion ili ne posedas. Devante unue konkeri la politikan potencon, evolui al nacia klaso, mem konstituiĝi al nacio, la proleto mem ankoraŭ estas nacia, eĉ se tute ne en la senco de la burĝaro.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 59

*

Ni lasis la manuskripton [„La germana ideologio”] al la ronĝa kritiko de la musoj des pli volonte, ĉar ni atingis nian ĉefan celon – memkompreniĝon.

Zur Kritik der politischen Ökonomie, Vorwort, MEW 13, 10

*

La proletaro uzos sian politikan regadon por iom post iom eltiri el la burĝaro la tutan kapitalon, por centralizi ĉiujn produkto-instrumentojn en la manon de la ŝtato - tio signifas la proletaro, organizita kiel reganta klaso - kaj por multigi kiom eble plej rapide la produktado-fortojn.

Tio kompreneble povos okazi komence nur pere de despotaj intervenoj en la rajton je proprieto kaj en la burĝajn produktado-rilatojn, do pere de intervenoj, kiuj ŝajnas ekonomie nesufiĉaj kaj neteneblaj, sed kiuj dum la evoluo de la movado superos sin mem, fariĝantaj neeviteblaj kiel rimedoj de la revoluciigo de la tuta produktadmaniero.

Tiuj intervenoj nature estos malsamaj laŭ la diversaj landoj. Por la plej progresintaj landoj jenaj intervenoj estos

Socialismo kaj komunismo

aplikataj relative ĝenerale:

1. Senproprietigo de la tero kaj utiligo de la terrento por ŝtataj elspezoj.
2. Imposto forte laŭgrada.
3. Forigo de la heredorajto.
4. Konfiskado de la proprietaĵo de ĉiuj elmigrintoj kaj ribeluloj.
5. Centralizo de la kredito en la manojn de la ŝtato pere de nacia banko kun ŝtata kapitalo kaj ekskluziva monopolo.
6. Centralizo de la transportaj aferoj en la manojn de la ŝtato.
7. Plimultigo de ŝtatproprietaj fabrikoj, de produktadoinstrumentoj, kultivado kaj plibonigado de la terposedaĵoj laŭ komuna plano.
8. Sama labordevo por ĉiuj, kreo de industriaj armeoj, aparte por agrikulturo.
9. Kunigo de agrikulturo kun industrio, laŭgrada iom-post-ioma forigo de la diferenco inter urbo kaj vilaĝo.
10. Publika kaj senpaga edukado de ĉiuj infanoj. Forigo de la fabriklaboro de infanoj en la nuna formo. Kunligo de la edukado kun la materiala produktado ktp.

Manifesto de la Komunista Partio, p. 61-62

*

La komunistoj ĉie subtenas ĉian ajn revolucionan movadon kontraŭ la ekzistantaj sociaj kaj politikaj cirkonstancoj.

En ĉiuj ĉi movadoj ili elstarigas la demandon pri la propri-

eto kiel la bazan demandon de la movado, en kiu ajn pli aŭ malpli evoluinta formo aperis tiu demando.

Fine, la komunistoj laboras ĉie por la unuiĝo kaj interkompreniĝo de la demokrataj partioj de ĉiuj landoj.

La komunistoj malŝatas kaŝi siajn konceptojn kaj intencojn. Ili malkaŝe deklaras, ke iliaj celoj povas esti atingitaj nur per perforta renverso de ĉiu ĝisnuna sociordo. Timtremu la regantaj klasoj pro komunista revolucio. La proletoj per ĝi povas perdi nenion, krom siajn ĉenojn. Ili povas gajni mondon.

Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!

Manifesto de la Komunista Partio, p. 78

Esperantaj versioj de verkoj de Karlo Markso cititaj en tiu ĉi libro

Ne malgranda parto de la citaĵoj havas nuntempe, dum tiu ĉi dua eldono de la libro, jam fontindikojn de marksaj verkoj aperintaj nialingve. Ili estas facile rekoneblaj per la Esperantlingva titolo de la koncerna fontindiko. Jen la ĝis nun aperintaj verkoj de Markso:

Karl Marx kaj Friedrich Engels: Manifesto de la komunista partio, Esperanta traduko kaj postparolo de Detlev Blanke, Progreso, Moskvo, 1990, ISBN 5-01-002341-5.

Karlo Markso: La kapitalo, Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio, Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, **Ĉapitroj unua ĝis naŭa**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-918300-13-7

Karlo Markso: La kapitalo, Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio, Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, **Ĉapitroj deka ĝis dektria**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2010, Monda Asembleo Socia (MAS) 2010, ISBN 978-2-918300-14-4 (aperonta libroforme en aŭtuno de 2010)

Karlo Markso: La interna milito en Francio (1871, La Pariza Komunumo), kun enkonduko de Frederiko Engelso, tradukita de Vilhelmo Lutermano, Mondial, Novjorko, 2005, ISBN 1-59569-025-5

Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso kaj la letero al Bracke, tradukita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2-a eldono, 2010, ISBN 978-2-918300-21-2.

Karlo Markso: Dunlaboro kaj kapitalo, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 878-2-918300-00-7

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

Karlo Markso: Parolado pri la demando de liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, tradukita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-918300-02-1;

Karlo Markso: La mizero de la filozofio, Respondo al Prudono: „La filozofio de la mizero”, Kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso kaj de Henri Mougin; Pri J. P. Prudono, Letero al J. B. v. Schweitzer, tradukita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, ISBN 978-2-918300-08-3,

Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo, Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo socia (MAS), 2010, ISBN 978-2-918300-17-5

Postparolo de la tradukinto

Ĝis anktaŭ nelonge mi ege dubis pri la utilo foliumi en libro kiu enhavas nur citaĵojn elprenitajn el la kunteksto de densa scienca argumentado. Sed, gustumante kelkajn erojn de tiu libreto kun citaĵoj el verkoj kiujn mi legis antaŭ jardekoj, mi entuziasmiĝis. Jes, multajn tiajn tekstetojn oni povas afiŝi, pentri sur stratojn, dissendi retpoŝte, ĉe diversaj okazoj deklami...

Kompreneble ili ne taŭgas por anstataŭi legadon de la kompletaj tekstoj. Kelkaj de ili estas eble eĉ ne plene kompreneblaj sen la kompleta teksto el kiu ili estas tiritaj. Sed kiam ili estas konkludoj de antaŭa argumentado, ili povas doni sciemon koni ankaŭ tiun.

Multaj tekstetoj de ĉi libreto sonas kiel frapaj konkludoj pri aktualaj eventoj, kun agpropo inkluzive.

Mi tradukis la tekstojn rekte el la germanlingva citatlibro kaj ne sisteme kontrolis ilin, kiel envere ja decus, per komparo kun la originalo – la verkaro de Markso kaj Engelso.

Kelkajn tekstojn mi tamen ne bezonis traduki, ĉar ili jam ekzistas nialingve; tio koncernas du librojn, unu tradukitan de Detlev Blanke, la alian de mi.¹

La tradukoj el „Manifesto de la Komunista Partio” apogas sin ne nur, sed grandparte sur la traduko de Detlev Blanke: Karl Marx kaj Friedrich Engels, Manifesto de la Komunista Partio, Esperanta traduko kaj postparolo de Detlev Blanke,

1 *Aldono al tiu ĉi 2-a eldono*: Intertempe pasis pli ol du jaroj, en kiuj pluraj aliaj verkoj de Markso tradukiĝis nialingven. Por ili la fontindikoj celas nun jam ne la germanlingvajn originalojn, sed la Esperantajn versiojn, kvankam la traduko mem povas esti kelkfoje ne tute sama (mi kiom eble plej konservis ĉi tie la unuan tradukon). Temas pri la verkoj listigitaj antaŭ tiu ĉi postparolo.

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

eLibro, Aranĝis: Franko Luin, ISBN 91-7303-142-9:

<http://www.omnibus.se/inko>

La tradukoj el „Salajro, prezo kaj profito” estas prenitaj de Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito, tradukis Vilhelmo Lutermano, kun postparolo de la tradukinto, Monda Asembleo Socia (MAS), 2007, ISBN 978-2-9529537-1-9

Ĉar mi ne disponis pri mia libraro kaj devis limigi min al tio kion mi trovis en Interreto, mi ne povis kontroli ĉiujn fontindikojn de la indikitaj germanaj tekstoj. En kelkaj okazoj kie mi ne trovis la tekston ĉe la indikita loko, mi metis la fontindikon inter rektaj krampoj. En tre multaj okazoj mi precizigis la fontindikojn kompare kun tiuj en „Marx heute”.

La fontindikoj – escepte se temas pri kopioj aŭ adaptadoj de jam ekzistantaj Esperantaj tradukoj – mencias ĝenerale la „verkaron de Markso kaj Engelso” (MEW = Marx-Engels-Werke), la fame konatajn „bluajn volumojn”, kiu aperis siatempe en Berlino (Germana Demokratia Respubliko): Karl Marx / Friedrich Engels – Werke. (Karl) Dietz Verlag, Berlin/DDR

La originalaj tekstoj troviĝas, germane, ĉe jena retadreso (libere elŝuteblaj): <http://www.mlwerke.de/me/default.htm>

Restas al mi deziri al la legantoj legan plezuron ĉe foliumado en tiu ĉi libro, sciemon por iom enprofundiĝi en la verkoj de de kiaj „klasikuloj” kaj, ĉefe, ne heziti citi ilin kie ajn la situacio taŭgas ...

Aĥ, ne forgesu: ... unuiĝu!

Vilhelmo Lutermano

Pedro Betancourt, oktobro 2008

Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto (reta, laŭokaze papera) *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retroŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro „Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...”. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la repaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen en la vico de ilia apero:

– **C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), 2007, 127 p., ISBN

– **Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseoj pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007, 127 p., ISBN

– **Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007, 59 p., ISBN 978-2-9529537-1-9

– **Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, 2007, 120 p., ISBN 978-2-9529537-4-0

– **GBEGLO Koffi: Esperantuĵismo**, 2008, 72 p., ISBN 978-2-9529537-5-7

– **Johano Besada: Eseoj**, 2008, 92 p., ISBN 978-2-9529537-3-3

– **Karlo Markso: Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. de Vilhelmo Lu-

termano, 2008, p. 91 p., ISBN 978-2-9529537-8-8;

2-a eld. 2010, ISBN 978-2-918300-29-8

– **Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), elhispanigita de Amparado Cisnero, 2009, 84 p., ISBN 978-2-9529537-7-1

– **Dominique Vidal kun Sébastien Boussois: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn 1947-1949**, elfrancigis Vilhelmo Lutermano, 2009, 361 p., ISBN 978-2-9529537-6-4

– **Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indigenaj kaj Tribaj Popoloj** – trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009, 230 p., ISBN 978-2-9529537-9-5

– **Karlo Markso: Dunlaboro kaj kapitalo**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-00-7

– **Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009, 52 p., ISBN 978-2-918300-02-1

– **Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009, 44 p., 2-a eld. 2010, ISBN 978-2-918300-21-2

– **Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo**, 2009, 103 p., ISBN 978-2-918300-05-2

– **Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio**. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, 2009, 112 p., ISBN 978-2-918300-04-5

– **Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj**. François Jullien: Ĉinscienco en sakstrato – Ĉinio en la spuglo de Okcidento; Manfred Szameitat: Sukcesa, sed ne socialisma; Ingo Nentwig: Naciaj malplimultoj kaj politiko pri naciaj malplimultoj en la PR Ĉinio; Barry Sautman: Protestoj kaj separismo en Tibeto; Michael Parenti: La mito de Tibeto; Enfu Cheng: Fundamentaj trajtoj de la socialisma merkatekonomio; Jian Xinhua: Harmonia socio, salajrolaboro kaj klasbataloj; Theodor Bergmann: La socialisma disvolvo-strategio de la PR Ĉinio; Rolf

Berthold: Pri la interna kaj ekstera politiko de la KP de Ĉinio; Li Bingyan: Ĉinio sub influo de la novliberalismo; Helmut Peters: Popolrespubliko Ĉinio: 30 jaroj da reform- kaj malferm-politiko; Jean-Louis Rocca: Ĉu la ĉina meza klaso estas revolucia? Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009, 142 p., ISBN 978-2-918300-06-9

– **Karlo Markso: La mizero de la filozofio**, respondo al J. B. Prudono: „La filozofio de la mizero“; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono**. Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009, 196 p., ISBN 978-2-918300-08-3

– **Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1**, Jörg Goldberg: La historia pozicio de la nuna ekonomia krizo – pli da demandoj ol respondoj, Horst Hensel: La nomoj de la mono – kontribuado al karakterizo de la nuna kapitalismo, Harald Werner: Notoj pri la psihologio de la krizo, Sarah Wagenknecht: Brulfaristoj kiel fajrobrigado – Kritiko de la krizmastrumado, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, 2009, 57 p., ISBN 978-2-918300-09-0

– **Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo – La Kuba Kvinopo, Howard Zinn**: La radikoj de la politiko de Usono rilate Kubon, **Noam Chomsky**: Kubo kaj Usono – preskaŭ duonjarcento da teroro, **William Blum**: La nepardonebla revolucio, **Michael Parenti**: Agreso kaj propagando kontraŭ Kubo, **Piero Glejeses**: Kubo, Afriko kaj la kvin kubanoj, **Ignacio Ramonet**: Miamo, nesto de teroristoj, **Salim Lamrani**: La Kuba-Usona Nacia Fondaĵo (KUNF) kaj la internacia terorismo, **Leonard Weinglass** : La proceso kontraŭ la Kuba Kvinopo, **Wayne Smith**: Trista paĝo en la historio de usona juro, **Saul Landau**: Kvin kubanoj en malliberejo: viktimoj de la obsedo de Bush, **Michael S. Smith**: Raporto pri du procesoj, **James Petras**: La Kvin Kubanoj – kandidatoj por la Nobel-premio, **Jitendra Sharma**: Veraj batalantoj kontraŭ terorismo, **Ricardo Alarcón de Quesada**: La kazo de la Kvin –pruvo de la terorismo de Usono kontraŭ Kubo, **Gianni Miná**: Historio kiun la amaskomunikiloj kaŝas – la kvin kubanoj, **Nadine Gordimer**: La homaro kiel reflektado de la justeco, tradukoj de div. MAS-anoj, 2009 tradukoj de div. MAS-anoj, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

– **Elisée BYELONGO IŜELOKE: Eĥoj el Bembujo**. Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolan0-11-3do-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al Esperanto, 2009, 91 p., ISBN 978-2-918300

– **Oktobra Revolucio kaj la sekvoj**. Moshe Lewin: La Oktobra

Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovet socio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2009, 48 p., ISBN 978-2-918300-07-6

– **Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2**, Joachim Bischoff: La financkrizo kaj alternativoj, Andreas Fisahn: Demokratia stirado de la ekonomio, Manfred Sohn: Dek tezoj por sociigo de la cirkuladsfero, Luciano C. Martorano: Socialismo, sociigo, demokratio, Manfred Lauer mann: La dialektika plan-ekonomio de Ĉinio – respondo al la financkrizo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009, 81 p., ISBN 978-2-918300-12-0

– **La homo kaj lia naturo – La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj**. Lucien Sève: Ĉu la homo? – La marka antropologio kaj ĝiaj bazaj konceptoj, Werner Seppmann: Mond- kaj hom-bildoj – Pri la formoj de ideologiaj potence reproduktado, Helga E. Hörz: Ĉu la hombildo krizas? Hans-Peter Brenner: Biopsihosocia unuo homo – kognacerb esplorado kaj ties impulsoj por la marksisma hombildo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009, ISBN 978-2-918300-15-1

– **Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2009, 381 p., ISBN 978-2-918300-13-7

– **Elisée BY'ELONGO ISHELOKE: Eĥoj el Bembujo**, 2010, 91 p., ISBN 978-2-918300-11-3

– **Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2010, ISBN 978-2-918300-17-5

– **Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, ISBN 978-2-918300-16-8

– **Arnold Petersen: Komentoj al la „Komunista Manifesto”**, tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, (reviziita reeldono de la sama, S.A.T., Parizo 1933), 2010, ISBN 978-2-918300-19-9

– **Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3** (2010), Werner Seppmann: Riskokapitalismo;, Richard Sorg: Domenico Losurdo interpretas Niĉeon;, Christina Kaindl: Subjektiveco en la krizo; Harald Werner: La krizo en la ordinara konscio; Christoph Butterwegge: Mondekonomia krizo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco,

Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, ISBN 978-2-918300-22-9

- Werner Seppman: Laboro kaj dialektiko – Pri la emancip-horizonto de la Marksa pensado; Harald Neubert: La „historia misio de la laborista klaso” ĉe Markso kaj Engelso kaj la historia realeco; Hans Kölsch: Kubo – Heinz Dietrich – kontraŭe; Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo? Eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2010, ISBN 978-2-918300-18-2

- Adjévi ADJE: El togolanda saĝosako, 2010, ISBN 9782-918300-20-5

- Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, ISBN 978-2-918300-25-0

- Ivan Efremov: La nebulozo de Andromedo, Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, 2010, ISBN 978-2-918300-24-3

- Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantujo, precipe ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Iliaj tekstoj estas libere elŝuteblaj por membroj de MAS.

Markso hodiaŭ – Nerefuteblaj citaĵoj

2-a eldono

Monda Asembleo Socia (MAS)

Presita en Germanio,

2010

ISBN 978-2-918300-29-8